Kiom? – Unu, du, tri, kvar...
Kioma[23]? – Unua, dua, tria, kvara...

Kiom da homoj estas sur la bildo? Sur la bildo estas **du** homoj: Peter kaj Maria.
Peter staras la unua kaj Maria staras la dua.
Kioma staras Peter? – La unu**a**.
Kioma staras Maria? – La du**a**.

Kioman lecionon ni lernas? Ni lernas la dekan lecionon. Kioma horo estas? Estas la deka horo.
Sur kioma paĝo ni lernas? Sur la paĝo 48.

Je

La infanoj iras al la lernejo, kiam estas la oka horo.
Kiam ili iras al la lernejo? Matene, **je**[24] la oka horo.
Je kioma horo? – **Je la oka**.
Kiam komencas labori via patro? Matene je la sesa horo.
Je kioma horo? – Je la sesa.

Maria manĝis je la sepa horo. Mia frato estas je du jaroj pli juna ol mi. Vi estas je kapo pli alta ol mi.

DATO[25]

Kiu tago estas hodiaŭ? – Hodiaŭ estas mardo.
Kiu dato estas hodiaŭ? – La 14-a de oktobro 2006.
Kiu dato estos morgaŭ? – La 15-a de oktobro 2006.
Kiam vi naskiĝis? – La 5-**an** de januaro 1999.
Kiam naskiĝis via patro? – La 22-an de januaro 1970.

-ar-

Tio estas arb**ar-**[26].
En la arbaro estas multaj arboj.



Tio estas vagon**aro**.
Kiom da vagonoj ĝi havas?

Apud nia urbo estas granda arbaro. Ĉu vi ŝatas veturi[27] per aŭto aŭ vagonaro? Maria havas nigran hararon.

Ĝis



La vagonaro veturas de Bratislava ĝis[28] Brno.

Mi estis ĉe mia amiko ĝis la vespero. Ĝis kioma horo? Ĝis la oka. Mia patro laboras de lundo ĝis vendredo. Ĝis hodiaŭ mi ne ricevis[29] vian leteron. Ĝis revido[30]!



aŭto

la aŭto ne iras, sed – veturas

veturi

ĝis



ricevi

lavi



rigardi



vidi

doni kaj ricevi

interŝanĝi

interŝanĝi leterojn

korespondi



adreso

longa



mallonga

bona, kiun ni amas

kara

Peter, Maria, Eva...

nomo



bildkarto

poŝtmarko

Si Sia

Ŝi lavas[31] sin[32].

Ŝi lavas lin.

Mi lavas **min**.
Vi lavas **vin**.
Li, **Ŝi**, **Ĝi** } lavas **sin**.
Ni lavas **nin**.
Vi lavas **vin**.
Ili lavas **sin**.

Li vidas[33] sin.



Ŝi vidas lin.

Mi ŝatas **mian** urbon.
Vi ŝatas **vian** urbon.
Li, **Ŝi**, **Ĝi** } ŝatas **sian** urbon.
Ni ŝatas **nian** urbon.
Vi ŝatas **vian** urbon.
Ili ŝatas **sian** urbon.

Mi legis mian libron kaj Maria legis sian libron. Unue ŝi lavis lin kaj poste ŝi lavis sin. Mia patro ŝatas veturi per sia aŭto. La knabino havis en sia hararo floron. Je kioma horo veturos la vagonaro? Peter kaj Maria dormas nokte en sia lito. Mi estas je unu centimetro pli alta ol vi. Ĝis kioma horo vi estis en la arbaro? Aŭto estas maŝino[34]. Maria amas sian patrinon. Kiu rigardas, tiu vidas.

Peter skribas leteron

Peter volas korespondi[35]. De sia instruisto li ricevis adreson de hungara[36] knabo. Nun li skribas sian unuan mallongan[37] leteron en Esperanto:

Kara[38] amiko,

mi estas 12-jara lernanto kaj mi volas korespondi kun vi. Mia nomo[39] estas Peter kaj mi lernas en la sepa klaso. En nia klaso estas 30 gelernantoj. En kioma klaso vi lernas? Kiom da gelernantoj estas en via klaso? Mi havas multajn geamikojn kaj unu pli junan fratinon. Ŝia nomo estas Maria kaj ankaŭ ŝi lernas Esperanton. Mi sendas al vi bildkarton[40] de nia urbo. Mi volas interŝanĝi[41] kun vi poŝtmarkojn[42].

Salutas vin via slovaka amiko Peter.

Memoru:

Mia patro komencas labori je la kvina horo. *Ayah saya mulai bekerja pada pukul 5.* Hodiaŭ estas la 14-a de oktobro 2006. *Hari ini tanggal 14 Oktober 2006.* Mi naskiĝis la 7-an de aprilo 1999. *Saya lahir pada tanggal 7 April 1999.*

Kompletigu:

Mi amas ..... gepatrojn. La vagonaro veturas de Bratislava ..... Brno. Mi petas, diru al mi, ... horo estas. Mia patro komencas labori ..... la sesa horo. Mi naskiĝis la 7-..... de januaro. Mi dormis de la hieraŭa vespero ..... la hodiaŭa mateno.

GRAMATIKO

je **Je** kioma horo? *Pada pukul berapa?* **Je** la sepa. *Pada pukul 7.* Li estas **je** centimetro pli alta. *Dia satu sentimeter lebih tinggi.* **Je** la komenco. *Pada permulaan.*
Je *– preposisi yang tidak mempunyai makna yang jelas. Biasanya digunakan untuk mengungkapkan tanggal, atau jika tidak ada preposisi lain yang cocok.*

dato La 1-**a** (unua) de majo 2006. *1 Mei 2006.*
La 16-**a** de junio 2007. *16 Juni 2006.*

Tanggal mengandung : artikel **la** *+ bilangan ordinal + nama bulan + tahun.*

Kiam? – La 1-**an** de majo 2006. ***Kapan?*** *Pada tanggal 1 Mei 2006. Ketika orang bertanya dengan pertanyaan* ***kapan?****, bilangan ordinal yang menunjukkan tanggal mendapat akhiran* **-n.**

-ar- Arbo – arb**ar**o. *Pohon – hutan.* Haro – har**ar**o. *Rambut (tunggal) – (kumpulan) rambut. Sufiks* **-ar-** *menyatakan kumpulan suatu benda.*

si **sia** Peter lavas **sin**. *Peter memandikan dirinya.*
Ŝi amas **sian** patrinon. *Dia mencintai ibunya.*

*Esperanto mempunyai kata ganti refleksif "***si***" dan kata ganti milik refleksif "***sia***". Keduanya hanya digunakan untuk kata ganti orang ketiga, tunggal maupun jamak.*

Kosakata:

1 – kalender, 2 – malam, 3 – bulan, 4 – Januari, 5 – Februari, 6 – Maret, 7 – April, 8 – Mei, 9 – Juni, 10 – Juli, 11 – Agustus, 12 – September, 13 – Oktober, 14 – November, 15 – Desember, 16 – atau, 17 – kapan, 18 – pada malam hari, 19 – awal, 20 – akhir, 21 – di rumah, 22 – lahir, 23 – keberapa, 24 – pada (dll.), 25 – tanggal, 26 – hutan, 27 – berkendara , 28 – hingga, sampai, 29 – menerima, 30 – sampai jumpa, 31 – mencuci, 32 – dirinya (sendiri), 33 – melihat, 34 – mesin, 35 – berkorespondensi (surat-menyurat), 36 – Hongaria, 37 – pendek, 38 – yang tersayang, 39 – nama, 40 – kartu pos bergambar, 41 – tukar-menukar, 42 – prangko.

11 DEK-UNUA LECIONO

Kio?	Tio	Io	Ĉio	Nenio

pakaĵo

havas
en la kapo

scias

prenas

ni ne scias
kio

io

tio + tio + tio...

ĉio

nenio

ni ne scias
kiu

iu

tiu + tiu + tiu...

ĉiu

Kio estas tio? Tio estas pakaĵo[1]. Kio estas en la pakaĵo? En la pakaĵo estas io[2], sed ni ne scias[3] kio.



Maria prenis[4] ĉion[5]. Kio estas nun en la pakaĵo? – Nenio[6]. Ĉion havas Maria. Ĉio estas ŝia.

Tio estas ĉio, kion mi volis diri al vi. Ĉion mi donis al vi, nun mi havas nenion. Ĉu vi diris ion? Ne, mi diris nenion. Pli bona estas io ol nenio. Ĉu vi vidas ion? Ĉu tio estas ĉio?

Kiu?	Tiu	Iu	Ĉiu	Neniu



Kiu estas tiu homo? Li estas iu[7], sed ni ne scias, kiu. Ĉu li havas kapon? Jes. Ĉu ankaŭ Maria havas kapon? Jes. Ĉiu[8] homo havas kapon. Neniu[9] homo povas vivi[10] sen la kapo.

Kiu lernas, tiu scias. En tiu domo loĝas iu homo. Ĉiu rozo estas floro, sed ne ĉiu floro estas rozo. Ĉu iu estas en la ĝardeno? Ne, en la ĝardeno estas neniu. Ĉiuj anoj de la familio estas hejme. La patrino donis pomojn al ĉiuj infanoj. Neniu homo scias ĉion. Kiu ne parolas, tiu ne eraras. Ĉiuj homoj estas unu granda familio.

-ig-

La infano ne volas dormi.
Kion faras la patrino?
– Ŝi dorm**ig**as[11] la infanon.

Ĉu tiu knabo estas pura[12]? Ne, li estas malpura. Kion faras Maria? Ŝi lavas lin. Ŝi pur**ig**as la knabon per akvo.

La lakto estis varma[13], sed nun ĝi estas malvarma. Varmigu ĝin! Purigu la tabulon! Mi estis malsata, sed la manĝo satigis min. Maria beligis sian hararon per floroj.

-iĝ-

Ili estas amikoj. Ili amik**iĝ**is[14] antaŭ tri jaroj. (Ili komencis esti amikoj antaŭ tri jaroj.)

La tago komenciĝas per mateno kaj finiĝas per vespero. Kiam mi naskiĝis, mia pli aĝa frato fariĝis lernanto. Mi fermis la libron. La libro fermiĝis. Miaj manoj malpuriĝis. La lakto malvarmiĝis, mi varmigos ĝin. La lernanto pliboniĝis. La glaso estis malplena[15], sed mi plenigis ĝin per akvo. Nun ĝi estas plena. Mi multe laboris kaj nun mi estas laca[16]. Mi laciĝis. La laboro lacigis min. Vesperiĝas[17]. Kio komenciĝis, tio ankaŭ finiĝos.

ne estas iu

neniu

la homoj kaj la bestoj vivas

vivi

li ne vivas



pura, malpura

varma



plena



malplena

fari ion ...-a

igi

fari sin ...-a

iĝi



laca

printempo

somero

aŭtuno

vintro

LA SEZONOJ



La jaro havas kvar sezonojn[18]: printempo[19], somero[20], aŭtuno[21] kaj vintro[22]. Printempo komenciĝas la 21-an de marto, somero la 21-an de junio, aŭtuno la 23-an de septembro kaj vintro la 21-an de decembro. Vintre la noktoj longiĝas kaj la tagoj mallongiĝas. Printempe floras[23] floroj kaj aŭtune la arboj havas fruktojn. La arboj havas somere verdajn[24] foliojn[25]. Kiu el la sezonoj estas la plej bela? Maria pleje[26] ŝatas someron: somere ŝi povas bicikli, naĝi[27] kaj promeni. Somere estas varme. Peter ŝatas vintron, ĉar vintre li povas skii[28]. La avino tre[29] ŝatas printempon, ĉar printempe ĉio floras. La avo ŝatas aŭtunon: aŭtune maturiĝas[30] fruktoj en la ĝardeno kaj aŭtuno havas belajn kolorojn[31]. Kiam la pomoj estas maturaj, ili estas ruĝaj kaj flavaj[32]. Verda pomo ne estas matura. Matura citrono estas flava. Nia avo estas maljuna. Li maljuniĝis.

***

V. Setälä:

LA JARO

Tridek tagoj en septembro,
en april'[33], juni', novembro.
Dudek ok en februaro,
dudek naŭ en superjaro[34].
Restas[35] sep monatoj, kiuj
havas tridek unu ĉiuj...

LA SEMAJNO

Lundo, mardo kaj merkredo,
poste ĵaŭdo kaj vendredo,
sekvas[36] sese la sabato
kaj la sepa, la dimanĉo.
En la kapo – sen eraro –
la semajna kalendaro.

Memoru:

Mi havas nenion. *Saya tidak punya apa-apa.* Mi diris nenion. *Saya tidak mengatakan apa-apa.* En la domo estas neniu. *Tidak ada orang di dalam rumah. Hanya boleh ada satu ungkapan negatif dalam sebuah frasa Esperanto agar artinya negatif. Negatif dua kali akan membuatnya menjadi ungkapan positif: "*Mi ne povas ne iri*" berarti "Saya harus pergi". Ini sama saja seperti mengatakan "Saya tidak bisa tidak pergi" dalam bahasa Indonesia.*

Respondu:

Kion prenis Maria el la pakaĵo? Kio restis en la pakaĵo? Ĉu ĉiu floro estas rozo? Kion faris la patrino, kiam ŝia infano ne volis dormi? Kiam vi amikiĝis kun via amiko? Per kio komenciĝas (finiĝas) la tago? Kiam vi fariĝis lernanto? Kiujn sezonojn havas la jaro? Kiam komenciĝas printempo? Kiam maturiĝas fruktoj? Kiun sezonon vi ŝatas? Kial? Kiu sezono estas la plej varma? Kiu sezono estas nun?

Kompletigu:

La jaro komenc.... la unuan de januaro kaj fin.... la 31-an de decembro. Kiu malpur.... la tabulon? Pur.... ĝin per akvo! Hodiaŭ mi havis multe da laboro kaj mi lac.... . La patrino plen.... botelon per akvo. Kio komenc.... , tio ankaŭ fin..... .

GRAMATIKO

kio	**tio**	**io**	**ĉio**	**nenio**	***Apa, itu, sesuatu, segalanya, tiada.***
kiu	**tiu**	**iu**	**ĉiu**	**neniu**	***Yang mana/siapa, yang (orang) itu, seseorang, setiap orang, tak ada siapa-siapa.***

Apakah anda memperhatikan kata-kata di atas punya kemiripan? Kata tanya diawali dengan huruf **k**, *kata tunjuk dengan huruf* **t**. *Sesuatu yang tak tentu diawali* **i** *(***io**, **iu** *seseorang sesuatu yang tak pasti; yang tak pasti). Semua atau setiap diawali* **ĉ** *dan negasi/ingkaran dengan* **nen-**.

-ig- Dormigi, purigi, varmigi. *Menidurkan, membersihkan, memanaskan. Akhiran* **-ig-** *bermakna "membuat sesuatu seperti kata dasarnya".*

-iĝ- Amikiĝi, komenciĝi, fermiĝi. *Berteman, berawal, menutup (intransitif). Akhiran* **-iĝ-** *berarti "menjadi seperti yang ada di kata dasar".*

printempo, somero, aŭtuno aŭ vintro

sezono



folio

folio estas verda

verda



citrono

citrono estas flava

flava

ruĝa, verda, bruna, flava...

koloro



biciklo

naĝi

skii

multe, forte

tre

granda, plenaĝa

matura

12-5=7

... restas 7

iras post, estas post

sekvas

April', juni', juli' (= aprilo, junio, julio).

Dalam bahasa puisi akhiran **-o** *pada kata benda bisa dihilangkan dan digantikan oleh apostrof di akhir kata. Kata sandang tertentu* **la** *hilangkan* **-a** *nya dan diganti dengan apostrof:* de la homo = de l' homo.

Eniri, eliri, kuniĝi, aliĝi, envagoniĝi, altabliĝi, kune, poste.

Masuk, keluar, datang bersama, masuk ke kereta, menuju ke meja, bersama-sama, kemudian. Beberapa preposisi dapat digunakan sebagai awalan sehingga membentuk kata-kata baru.

Kosakata:

1 – paket, 2 – sesuatu, 3 – mengetahui, 4 – mengambil, 5 – segalanya, 6 – tiada, 7 – seseorang, sesuatu, 8 – setiap (orang), 9 – tidak ada (siapa-siapa atau sesuatu), 10 – hidup, 11 – menidurkan, 12 – bersih, 13 – panas, 14 – berteman, 15 – kosong, 16 – lelah, 17 – menjadi senja, 18 – musim, 19 – musim semi, 20 – musim panas, 21 – musim gugur, 22 – musim dingin, 23 – berkembang, 24 – hijau, 25 – daun, 26 – paling, 27 – berenang, 28 – main ski, 29 – sangat, 30 – menjadi matang, 31 – warna, 32 – kuning, 33 – April, 34 – tahun kabisat, 35 – tinggal, 36 – mengikuti.

Ayo bermain:

Tulislah di atas kertas dalam waktu lima menit sebanyak mungkin kata-kata dalam bahasa Esperanto yang dapat Anda ingat. Pemenangnya adalah yang bisa menuliskan kata paling banyak.

12 DEK-DUA LECIONO

Kia?	Tia	Ia	Ĉia	Nenia

Kia demando, tia[1] respondo. Kia patrino, tia filino. Kia la vivo, tia la morto[2]. Kia la arbo, tia la frukto. Ne estu tia! Kiam ni ne scias kia, ni diras ia[3]. Antaŭ nia domo staras ia aŭto. Ĉia[4] dono estas bono. Mi ne havas libron: mi havas nenian[5] libron. La akvo havas nenian koloron.

Kie?	Tie	Ie	Ĉie	Nenie

Kie vi loĝas? – Mi loĝas tie, en tiu bela domo. La domo staras sur bela loko[6]. Kiam ni ne scias kie, ni diras ie[7]. Mi vidis ie tiun homon, sed mi ne scias kie. Mia amiko loĝas ie en la urbo. Ĉie[8] mi havas amikojn, nenie[9] mi havas malamikojn. Ĉie estas bone, sed hejme plej bone.

Kiam?	Tiam	Iam	Ĉiam	Neniam

Kiam mi estas en la lernejo, tiam[10] mia patro laboras. Kiam ni ne scias kiam, ni diras iam[11]. Iam mi vidis tiun homon. Mi restos ĉiam[12] via amiko. Mi ne scias naĝi, ĉar mi neniam[13] naĝis. Pli bone iam ol neniam. Kiam la kato ne estas hejme, tiam la musoj[14] dancas[15]. Ĉu vi iam skiis? – Ne, neniam.

-eg-	-et-

Tio estas dom**et**o[16].



Tio estas dom**eg**o[17].

☞ -a
tia
fino de la vivo
morto
ni ne scias kia
ia
tia+tia+tia...
ĉia
kia? – nenia
tio, kie io estas
loko
sur iu loko
ie
sur neniu loko
nenie
minuto, horo, jaro...
tempo
en tiu tempo
tiam
en iu tempo
iam

en ĉiu tempo

ĉiam

en neniu tempo

neniam

muso

dancas

dometo



domego



ridas

Granda domo estas domego. Granda urbo estas urbego. Tre bela estas belega. Tre varma estas varmega. Malgranda domo estas dometo. Malgranda urbo estas urbeto. Somere estas varme kaj varmege. Vintre estas malvarme kaj malvarmege. Tio estas mia libreto. Ega estas tre granda kaj eta estas tre malgranda. Kio estas: montego[18], arbego, grandega, hundeto, knabeto, tabuleto, papereto, ĉambrego, altega?

Ŝi ridetas[19].

Ŝi ridas.

Ŝi ridegas.

Ŝi ploretas[20].

Ŝi ploras.

Ŝi ploregas.

MATENO

Estas mateno. La suno[21] jam[22] brilas[23]. Peter kaj Maria ankoraŭ kuŝas[24] en sia lito kaj dormas. Estas la sepa horo kaj komenciĝas belega tago. Ĉu iuj familianoj ankoraŭ dormas? – Ne! Ĉiuj jam ellitiĝis, nur[25] la infanoj estas ankoraŭ en siaj litoj.

La patrino estas en la kuirejo[26] kaj preparas[27] matenmanĝon[28]. Nun ŝi iras al la ĉambro, kie dormas la infanoj. Ŝi malfermas la pordon kaj vekas[29] ilin: "Bonan matenon, infanoj! Vekiĝu, jam estas la sepa horo!"

La unua eliras el la lito Maria. Ŝi iras al la banĉambro[30]. Tie ŝi lavas sin kaj purigas siajn dentojn[31]. Peter ŝatas kuŝi en la lito, sed kiam li vidas la malplenan liton de sia fratino, ankaŭ li ellitiĝas. La gefratoj lavis sin, vestis[32] sin kaj nun ili iras al la kuirejo.

Sur la tablo jam estas la matenmanĝo: en la tasoj[33] estas varma lakto, sur la teleroj[34] estas nigra pano, butero[35] kaj fromaĝo[36].

“Bonan apetiton[37]!”, diras la patrino. “Bonan apetiton!”, respondas la infanoj kaj komencas manĝi. Maria manĝas panon kun butero kaj trinkas lakton. Ĝi estis varmega, sed ĝi malvarmiĝis kaj nun estas varmeta. Peter manĝas panon kun marmelado[38]. Li ŝategas marmeladon. Maria prenas ankoraŭ fromaĝon. Peter ne ŝatas fromaĝon, neniam li manĝas ĝin.

La patrino rigardas la horloĝon[39]: “Estas jam la sepa kaj tridek minutoj. Vi devas[40] iri al la lernejo!”

Ĉiam la infanoj iras al la lernejo je la sepa tridek. Ankoraŭ ili donas kison[41] al la patrino, salutas ŝin kaj iras.

PROVERBOJ[42]

Kio komenciĝis, tio ankaŭ finiĝos. Ĉio havas sian “sed”. Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras. Mano manon lavas. Kiu vivos, tiu vidos. Ĉie estas bone, sed hejme plej bone. Pli bona estas io ol nenio. Fino bona – ĉio bona. En arbaro sidas kaj arbojn ne vidas.

Memoru:

Matenmanĝo, familiano, banĉambro, ripoztago. *Sarapan, anggota keluarga, kamar mandi, hari libur. Kata-kata baru dibentuk dengan menggabungkan kata-kata dasar yang sesuai. Kata dasar dengan arti utama* (-manĝo, -ĉambro) *diletakkan di akhir. Akhiran dari kata yang pertama dihilangkan, kecuali jika pengucapannya menjadi sulit* (manĝotablo – *meja makan*).

Legu:

Mi naskiĝis en urbeto, sed nun mi loĝas en urbego. Kiam mi estis eta knabo, mi iam ploris. Sed nun mi ne ploras. Viroj neniam ploras, ĉu ne? Printempe estas varmete, somere estas varme aŭ varmege, aŭtune estas malvarmete kaj vintre estas malvarme aŭ malvarmege. Komence mi kuretis, poste mi kuris pli kaj pli rapide kaj fine mi kuregis. Apud nia urbo estas montegoj. Nia hundeto ĉiam kuretas. Tiu knabino ĉiam ridetas.

Respondu kaj la respondojn skribu:

Kion faris Peter kaj Maria matene? Kion faris la patrino? Kiu el la infanoj ellitiĝis la unua? Kion faris la infanoj en la banĉambro? Kion diris la patrino antaŭ la matenmanĝo? Kio estis sur la tablo? Je kioma horo iris la infanoj al la lernejo?



ploras



suno

de nun

jam



brilas



kuŝas



kuirejo

fari ĉion

prepari

maldormigi

veki



banĉambro

dento

vestoj



taso

telero



butero



horloĝo

ne povi
ne fari

devi



fromaĝo

Je kioma horo vi hodiaŭ ellitiĝis? Kian koloron havas la akvo? Ĉu vi iam skiis? Ĉu vi neniam ploras?

GRAMATIKO



Kio, tio, io, ĉio, nenio. *Apa, itu, sesuatu, segalanya, tiada.*
Kiu, tiu, iu, ĉiu, neniu. *(orang) yang mana, (orang) itu, seseorang, setiap orang, tak seorang/sesuatu pun.*
Kia, tia, ia, ĉia, nenia. *Seperti apa, seperti itu, sejenis, setiap jenis, tidak seperti apa pun.*
Kie, tie, ie, ĉie, nenie. *Di mana, di sana, di suatu tempat, di setiap tempat, tidak di mana pun.*
Kiam, tiam, iam, ĉiam, neniam. *Kapan, saat itu, suatu saat, setiap saat/selalu, tak pernah.*

Kelompok kata "korelatif" kita berkembang. Kita sudah mengenal 25 di antaranya dan kita dapat dengan mudah mengingatnya: pertanyaan diawali **k-***, menunjuk sesuatu dengan* **t-***. Kata tak tentu dengan* **i-***, setiap/semua dengan* **ĉ-** *dan ingkaran dengan* **nen-***.*

-eg- -et-

Dom**eg**o, urb**eg**o, bel**eg**a. *Rumah besar, kota besar, sangat cantik.*
Dom**et**o, urb**et**o, hund**et**o. *Rumah kecil, kota kecil, anjing kecil.*

Akhiran **-eg-** *membesarkan dan akhiran* **-et-** *mengecilkan arti dari kata dasarnya.*

Kosakata:

1 – seperti itu, 2 – kematian, 3 – sejenis, 4 – setiap jenis, 5 – tak seperti apa pun, 6 – tempat, 7 – di suatu tempat, 8 – di mana-mana, 9 – tidak di mana pun, 10 – saat itu, 11 – suatu saat, 12 – selalu/setiap saat, 13 – tak pernah, 14 – tikus, 15 – menari, 16 – rumah kecil, 17 – rumah besar, 18 – gunung, 19 – tersenyum, 20 – menangis, 21 – matahari, 22 – sudah, 23 – bersinar, 24 – berbaring, 25 – hanya, 26 – dapur, 27 – menyiapkan, 28 – sarapan, 29 – bangun tidur, 30 – kamar mandi, 31 – gigi, 32 – berpakaian, 33 – cangkir, 34 – piring, 35 – mentega, 36 – keju, 37 – selamat makan, 38 – marmalade, 39 – jam, 40 – harus, 41 – ciuman, 42 – peribahasa.

malmulte, ne pli ol
nur

fari varman manĝon
kuiri


kiso

13 DEK-TRIA LECIONO

-il-

Ni tranĉas[1] per tranĉ**il**o[2]. La hararon ni kombas[3] per kombilo. Per kudrilo ni kudras[4] kaj per tondilo ni tondas[5]. Maria balaas[6] la ĉambron per balailo.



Tranĉilo, kulero[7] kaj forko[8] estas manĝiloj (manĝilaro[9]). Per manĝilaro ni manĝas.

Plumo, krajono kaj kreto[10] estas skribiloj. Kion ni faras per la skribiloj?

Sur la korto[11] ludas infanoj per siaj ludiloj. Per ŝlosilo[12] ni ŝlosas pordon. Mi volas tondi paperon, sed mi ne havas tondilon. La sonorilo[13] sonoris kaj la lernantoj komencis lerni. Per kio ni fajfas[14]? Per fajfilo aŭ per la buŝo. Birdo[15] estas besto, kiu havas du piedojn kaj du flugilojn[16]. Per la flugiloj ĝi povas flugi. Soldatoj[17] pafas[18] per pafiloj. En la kuirejo estas multaj kuriloj. Aŭto kaj vagonaro estas veturiloj. Kion ni faras per laboriloj?

ek-



Ŝi staras.



Ŝi eksidas[19].

Ŝi sidas.

tranĉilo

kombilo

kudrilo



tondilo

balailo

kulero

forko

kreto

loko antaŭ la domo

korto

ŝlosilo



pafilo



sonorilo



soldato



fajfilo



birdo



flugilo

ludiloj

fermi per ŝlosilo

ŝlosi

komenci sidi (sidiĝi)

eksidi

La infano ekploris (= komencis plori). Je kioma horo vi eklaboros? Mi petas, eksidu! Mi ne povas ekdormi. Ni povas ekiri. Sur la strato[20] mi ekvidis amikon. La vagonaro ekveturos post kvin minutoj.

Kies? (de kiu?) – mia, via, lia...

Sur la tablo estas libro. **Kies**[21] ĝi estas? – Ĝi estas **mia**. Kies patro laboras en fabriko? – Lia patro. Kies hundo estas antaŭ la domo? – Ŝia hundo. Kies filo vi estas? – Mi estas filo de miaj gepatroj. Kies voĉon[22] vi aŭdis el telefono? Per kies plumo vi skribas? En kies ĝardeno vi estis?

Ke

La patrino diris: "Maria ne estas hejme".
La patrino diris, **ke**[23] Maria ne estas hejme.

Ŝi diris: "...." = Ŝi diris, ke ....

Mi scias, ke vi estas mia bona amiko. Vi skribis, ke vi ricevis mian leteron. Mi aŭdis, ke vi estas malsana[24]. Ĉu vi pensas[25], ke tio estas bona? Mi pensas, ke jes.

Oni (iu, la homoj)

Tage **oni**[26] (la homoj) laboras, nokte oni dormas. En tiu familio oni parolas Esperante. En Slovakio oni parolas slovake, en Hungario oni parolas hungare. Ne ĉio estas vero[27], kion oni diras. Oni diras, ke vi estas malsana. Ĉion novan[28] oni ŝatas. Oni diras, ke kato havas naŭ vivojn.

Kiu? – mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili, **oni** (iu, la homoj)

Kiom? Tiom Iom

Kiom da kapoj, tiom[29] da ĉapoj. Kiom da homoj, tiom da gustoj[30]. Kiam ni ne scias kiom, ni diras iom[31]. Iom estas ne

multe. Donu al mi iom da akvo! En ĉiu malbono estas iom da bono. Li estas iom pli alta ol mi. Iom post iom. Ĉu vi volas iom da kafo? Ne parolu tiom!

EN LA KLASO

La lernantoj sidas en la klaso. La klaso estas en malnova lernejo. Ĝi havas altan pordon kaj grandajn fenestrojn. En la klaso estas nigra tabulo, bruna tablo, du librośrankoj kaj multaj benkoj[32]. Sur la plafono estas lampo. Sur la muroj estas kelkaj[33] bildoj, kiuj montras[34] bestojn, florojn, sezonojn kaj la homan korpon. La lernantoj sidas kaj babilas[35]. La pordo malfermiĝas kaj venas la instruisto. La lernantoj ekstaras kaj la instruisto salutas ilin: "Bonan tagon, infanoj!" Poste la lernantoj eksidas. Sur la planko kuŝas plumo. La instruisto demandas: "Kies plumo kuŝas sur la planko?" – "Mia", respondas la lernanto en la unua benko kaj prenas ĝin. La instruisto demandas: "Ĉu vi estas ĉiuj?" – "Ne, mankas unu lernanto", respondas iu knabo. "Hieraŭ li malsaniĝis kaj hodiaŭ li ne povis veni al la lernejo". Poste la instruisto demandas kaj la lernantoj respondas:

"Kio estas skribiloj?" – "Skribiloj estas iloj, per kiuj oni skribas." "Kio estas sur la homa korpo?" – "Sur la homa korpo estas kapo, kolo, manoj, piedoj kaj – vestoj." "Kion ni havas sur la kapo?" – "Okulojn, orelojn, nazon, buŝon, hararon kaj – ĉapon." "Kion ni faras per la buŝo?" – "Per la buŝo ni manĝas, trinkas, parolas kaj fajfas." "Kiam la homoj manĝas?" – "Kiam ili estas malsataj kaj – kiam ili havas ion bonan." "Kiujn sezonojn havas la jaro?" – "Printempon, someron, aŭtunon kaj vintron". "Kiujn laborilojn vi konas[36]?" – La lernantoj ne scias kaj silentas[37]. "Ĉu la demando estas malfacila[38]?" – "La demando estas facila, sed la respondo estas malfacila".

Respondu kaj la respondojn skribu:

Kion oni faras per tranĉilo (kombilo, kudrilo, tondilo, ŝlosilo)? Kies filo aŭ filino vi estas? Kiam oni laboras kaj kiam oni dormas? Ĉu vi pensas, ke Esperanto estas facila? Ĉu via lernejo estas nova? Kiom da benkoj estas en via klaso? Je kioma horo vi naskiĝis? Ĉu vi estas sana?

sur ĝi veturas aŭtoj

strato

de kiu

kies

tio, kion ni aŭdas, kiam iu parolas

voĉo

sana

malsana

laboras per la kapo

pensas

iu, la homoj

oni

tio, kio estas

vero

kio antaŭe ne estis (juna)

nova

ne multe

iom

benko

ĝi estas inter du ĉambroj

muro

vidigi per fingro

montri

ne multaj

kelkaj

interparoli

babili

ne esti

manki

scii, ke estas

koni

ne paroli

silenti

tia, ke ĉiu scias ĝin

facila

scii kia ĝi estas

koni

Buatlah kalimat dengan kata-kata ini:

Ekplori, eksidi, paroli, pensi, scii, ekdormi, ekveturi, ŝlosi, manki, silenti, malsaniĝi, ekfajfi, sonorilo, kudri, kombi, danci, malplenigi.

GRAMATIKO

-il-

Tranĉi – tranĉ**il**o, kudri – kudr**il**o, kombi – komb**il**o.
Memotong – pisau, menjahit – jarum, menyisir – sisir.

Akhiran **-il-** *menunjukkan alat, instrumen, alat bantu.*

ek-

Ekdormi, **ek**plori, **ek**stari.
Mulai tidur, mulai menangis, mulai berdiri.

Awalan **ek-** *menunjukkan awal dari perbuatan atau perbuatan segera.*

oni

Oni parolas. *Orang berbicara.*
Nokte **oni** dormas. *Pada malam hari orang tidur.*

Oni – *kata ganti orang tak tentu, biasanya diterjemahkan sebagai "orang" atau "kamu" atau kadang-kadang "mereka", tergantung konteksnya.*

Kosakata:

*1 – memotong, 2 – pisau, 3 – menyisir, 4 – menjahit, 5 – menggunting, 6 – menyapu, 7 – sendok, 8 – garpu, 9 – peralatan makan, 10 – kapur, 11 – halaman, 12 – kunci, 13 – lonceng, 14 – bersiul, 15 – burung, 16 – sayap, 17 – tentara, 18 – menembak, 19 – duduk, 20 – jalan, 21 – punya siapa, 22 – suara, 23 – bahwa, 24 – sakit (*sana = *sehat), 25 – memikirkan, 26 – orang, 27 – kebenaran, 28 – baru, 29 – sebanyak itu, 30 – nafsu makan, 31 – sedikit, beberapa 32 – bangku panjang, 33 – beberapa, 34 – menunjukkan, 35 – ngobrol, 36 – mengenal, 37 – mendiamkan, 38 – sulit* (facila = *mudah*).

14 DEK-KVARA LECIONO

-id-

Infano de besto nomiĝas **id**o[1]. Ido de ĉevalo estas ĉeval**id**o kaj ido de hundo estas hundido. Ankaŭ birdoj havas idojn. Birdidoj ne scias flugi, ĉar ili havas malfortajn[2] flugilojn. Miaj geavoj havas unu kokon[3], tri kokinojn kaj kvar kokidojn. Ili havas ankaŭ bovinon[4] kaj bovidon. La bovino donas al ili lakton kaj la kokinoj donas al ili ovojn[5]. Azeno[6] havas azenidojn, porko[7] havas porkidojn kaj ŝafo[8] havas ŝafidojn. Ĉu vi ŝatas katidojn?

infano de besto

ido



ĉevalido



hundido



koko



kokino

kokido



bovino

Kien? – ...-n



Kie**n**[9] li iras?
Al la ĝardeno.

Kie**n** li iras?
En la ĝardeno**n**[10].



Kie li iras?
En la ĝardeno.

Peter estas en la ĉambro (kie?) kaj iras al la fenestro (kien?). Maria estas en la pordo (kie?) kaj iras en la ĉambron (kien?). La kato iris sub la tablon (kien?) kaj nun ĝi kuras sub la tablo (kie?). La patro sidiĝis sur la seĝon (kien?) kaj nun li sidas sur ĝi (kie?). Kien vi rigardas? – Mi rigardas tien, kien vi. Kien vi iras? – Hejmen.

Pri

Hodiaŭ ni lernis pri[11] ĉevalidoj, hundidoj, kokidoj kaj bovidoj. Tiu libro estas pri la vivo de bestoj. Pri kio vi pensas? – Pri nenio. Ĉu vi jam parolis pri tio kun viaj gepatroj? Mi legis en gazeto[12] pri Esperanto. Mi ofte[13] pensas pri vi. Pri kio vi korespondas kun viaj geamikoj? En lernejo infanoj lernas pri matematiko[14], historio[15] kaj geografio[16]. Tiun problemon[17] ni devas priparoli. Ĉion bone pripensu!



bovido

azeno

forta



malforta



ovo



porko

kien?

Kial? Tial

Kial vi ne venis? – **Tial**[18], ĉar mi estis malsana. Hodiaŭ estas bela vetero[19], tial ni iros en arbaron. Ŝi estas malfeliĉa[20], tial ŝi ploras. La suno brilas kaj tial estas varme. La infano dormas, tial ĝi silentas.

Kiel? Tiel

Kiel vi fartas? – Mi fartas **tiel**[21] kiel vi. En Esperanto oni skribas tiel kiel oni parolas. Kial vi estas tiel malpura? Ŝi estas tiel bela kiel rozo. Li ne lernas tiel bone kiel ŝi. Kial vi estas tiel feliĉa? Mi estas tiel alta kiel vi, sed ne tiel alta kiel ŝi.

Ajn

Mi povas fari ĉion, kion mi volas: mi povas fari kion **ajn**[22]. Venu iam ajn (= venu ĉiam, kiam vi volas). Povas veni kiu ajn. Kie ajn vi estos (= ĉie kie vi estos), pensu pri mi. Kiun libron vi deziras? – Kiun ajn. Mi volas legi kion ajn. Tion povas fari kiu ajn.

Ĉi

Mi estas **ĉi tie**[23] = mi estas apud vi. En ĉi tiu leciono ni lernis pri bestoj kaj iliaj idoj. Venu ĉi tien! (= Venu al mi!) Ĉi tio estas pli proksima ol tio. Ĉi tiu libro (tiu libro al kiu mi montras per fingro) estas bela.

VESPERO

Estas vespero. La suno jam ne brilas. Finiĝas la tago. En la ĉambro lumas[24] lampo kaj en la forno[25] brulas[26] fajro[27]. Ĉiuj familianoj estas hejme. Antaŭ nelonge ili vespermanĝis kaj nun ili sidas en la ĉambro. La patro legas gazeton. La avo sidas en fotelo[28] kaj ripozas. Hodiaŭ li laboris en la ĝardeno kaj li laciĝis. Peter legas interesan romanon[29] kaj Maria rigardas koloran bildlibron pri bestoj. Ŝi diras al Peter: „Rigardu, kiel ĉarmaj[30] katidoj estas ĉi tie! Unu estas blanka, unu estas nigra

kaj unu katido estas kiel tigrido!“ – “Lasu min[31]”, respondas Peter. “Nun mi ne havas tempon!” Maria estas malfeliĉa, ke Peter estas tia. Tial ŝi iras al la kuirejo, kie laboras la patrino. “Ĉu mi povas helpi[32] al vi?” – “Jes, iru ĉi tien. Ni kune lavos la manĝilarojn, tasojn kaj telerojn.” Ili kune laboras kaj Maria rakontas[33] al la patrino, pri kio ŝi lernis hodiaŭ en la lernejo. Poste la patrino rakontas ion al Maria. Tiel ili laboras kaj babilas.

Kiam la patrino kaj Maria finis la laboron, ili venis en la ĉambron, kie estis la aliaj[34] familianoj. Kion ili faros nun? – La gepatroj kaj la geavoj rigardos televidon[35]. La infanoj ludos ankoraŭ ĝis la naŭa horo en sia ĉambro. Poste ili lavos sin, diros al la gepatroj kaj la geavoj “Bonan nokton!” kaj iros dormi. Kiam finiĝos la televida filmo[36], ankaŭ la aliaj familianoj enlitiĝos.

PROVERBOJ

Bojas[37] hundidoj, ĉar ankaŭ la hundo tiel faras. Kiu ne parolas, tiu ne eraras. Kiu ne laboras, tiu ankaŭ ne manĝu! En ĉiu malbono estas iom da bono. Ĉiu komenco estas malfacila. Kiu multe parolas, malmulte pensas. Ne vivu kiel vi volas, vivu tiel, kiel vi povas. Pli bona estas unu amiko malnova, ol du novaj. Nova balailo bone balaas.

Memoru:

Li kuris en ĝardeno. *Dia berlari di dalam taman*. Li kuris en la ĝardeno**n**. *Dia berlari menuju ke dalam taman*. Ĉion bone **pri**pensu! *Pertimbangkan segalanya dengan baik!* Ni tion ankoraŭ priparolos. *Kita akan membicarakan hal itu lebih lanjut.*

tien



ŝafo

gazeto

tiam+tiam +tiam+tiam...

ofte

matematiko



historio



geografio

brilas la suno = bela vetero

vetero

ridetas, ĉar ĉio estas bona

feliĉa

volas havi

deziras

tie – ĉi tie

apuda

proksima

lampo lumas

lumas

forno

fajro

fotelo

tre bela

ĉarma

labori kun

helpi

ne malhelpi

lasi

paroli pri io

rakonti

ne tiu ĉi, sed tiu

alia

Respondu la demandojn:

Kiel nomiĝas infanoj de bestoj? Kion donas al la homoj bovinoj kaj kokinoj? Pri kiuj bestoj ni lernis en ĉi tiu leciono? Ĉu vi estas tiel alta kiel via patro? Ĉu vi ĉiam povas fari kion ajn vi volas? Ĉu vi havas hejme fornon? Rakontu, kion faris via familio hieraŭ vespere!

GRAMATIKO

-id-

Hund**id**o, kat**id**o, ĉeval**id**o. *Anak anjing, anak kucing, anak kuda.*

Akhiran **-id-** *menunjukkan keturunan atau anak.*

Kien? – ...-n

Kie vi estas? *Di mana kamu?* Kien vi iras? *Mau pergi kemana kamu?* En la ĝardeno. *Di dalam taman.* En la ĝardeno**n**. *Menuju ke dalam taman.*

Akhiran **-n** *digunakan untuk menunjukkan arah. Kata depan* **al** *dan* **de** *sudah menunjukkan arah karenanya kita tidak menggunakan akhiran* **-n** *pada kedua kata depan ini.*

Ajn

Kiu **ajn**. *Siapa pun.* Kiam **ajn**. *Kapan pun.*
Kiel **ajn**. *Bagaimana pun.* Kiom **ajn**. *Berapa banyak pun.*

Ajn *berarti "pun" dalam bahasa Indonesia.*

Ĉi

Tiu, **ĉi** tiu. *(Orang) itu, (orang) yang ini.* Tia, **ĉi** tia. *Seperti itu, seperti ini.* Tio, **ĉi** tio. *Itu, ini.* Tie, **ĉi** tie. *Di sana, di sini.*

Kata **ĉi** *menunjukkan sesuatu yang berjarak dekat dengan kita. Bisa diletakkan sebelum atau sesudah kata yang diterangkan.*

Kosakata:

*1 – keturunan. 2 – lemah (*forta = *kuat), 3 – ayam jantan, 4 – sapi betina, 5 – telur, 6 – keledai, 7 – babi, 8 – domba, 9 – ke mana, 10 – menuju ke dalam taman, 11 – tentang, 12 – majalah, 13 – sering, 14 – matematika, 15 – sejarah, 16 – geografi, 17 – masalah, 18 – karena itulah, 19 – cuaca, 20 – sedih, 21 – seperti itu, 22 – apa pun juga, 23 – di sini, 24 – menerangkan, 25 – oven, 26 – terbakar, 27 – api, 28 – sofa, 29 – novel, 30 – menawan, 31 – meninggalkan, 32 – menolong, 33 – bercerita, 34 – yang lain, 35 – televisi, 36 – film, 37 – menggonggong.*

15 DEK-KVINA LECIONO

Por





Tiuj floroj estas **por**[1] vi.

Tio estas aŭto **por** kvar personoj[2].

Libro por infanoj. Ĉambro por gastoj[3]. Por kio vi venis? – Mi venis por vidi vin[4]! (Mi venis, ĉar mi volis vidi vin.) Mi havas nenion por manĝi[5]. Ĉu vi havas ion por trinki? Nun mi ne havas tempon por ludi kun vi. Por kiu estas tiu ĉokolado? – Por ŝi. Ni estas amikoj por ĉiam. Ni ne vivas por manĝi, sed manĝas por vivi[6].

Por ke ... -u

ke ... -u

Donu al mi plumon, **por ke** mi pov**u**[7] skribi.
Parolu malrapide, **por ke** ĉiu komprenu[8] vin.
Ni lernas, por ke ni sciu.

Mi volas, ke vi laboru[9]. (Mi volas: "Vi laboru!")
Ili volas, ke mi venu hodiaŭ. (Ili volas: "Mi venu... .")

Tra



La vagonaro veturas tra[10] la tunelo[11].

Tra la fenestro ŝi vidas la ĝardenon.

por

homo

persono

amiko
en nia domo

gasto

havi en la kapo bildon pri tio, kion ni aŭskultas

kompreni



tra



tunelo



ĉirkaŭ



kravato

kontraŭ

volas legi, sed ne povas

legus

mono

havas multe da mono

riĉa

flugmaŝino



kampo

ankaŭ tiel, ĉi tiel

same



mezo

12:00

tagmezo

post nelonge

baldaŭ

dekstre

Mi veturis per aŭto tra multaj urboj. Tra la fenestro brilas la suno. Li eniris[12] tra unu pordo kaj eliris[13] tra alia pordo. Ni longe iris tra arbaro. Ĉu vi jam tralegis[14] la tutan libron? Ne, mi nur trarigardis ĝin.

Ĉirkaŭ



La infanoj kuras **ĉirkaŭ**[15] la domo.

La familio sidas ĉirkaŭ la tablo.

La patro havas ĉirkaŭ la kolo kravaton. Ĉirkaŭ la domo estas ĝardeno. La domo estas ĉirkaŭ (plimalpli) dek metrojn alta. Venu ĉirkaŭ la sesa horo!

Kontraŭ

Kontraŭ[16] nia domo staras lernejo. La domoj staras unu kontraŭ la alia. Kion vi havas kontraŭ mi? Ĉu vi estas kun mi, aŭ kontraŭ mi?

Se ... -us

Mi leg**us**[17], sed mi ne havas libron. (Mi volas legi, sed mi ne havas libron.) Mi legus, **se**[18] mi havus libron. Se mi estus sana, mi estus feliĉa. Se estos bela vetero, mi venos. Sed se ne, mi restos hejme. Ĉu vi estus feliĉa, se vi havus multe da mono[19]? – Mi estus riĉa[20], sed mi ne scias, ĉu mi estus feliĉa.

Mi volus havi flugmaŝinon[21]. Se mi havus flugmaŝinon, mi estus feliĉa. Kion mi farus, se mi havus flugmaŝinon? Mi flugus super la urbo. Poste mi flugus ĉirkaŭ la urbo, super kampoj[22] kaj arbaroj... Multaj homoj

diras: “Mi lernus Esperanton, se ĉiuj homoj lernus ĝin.” Se ĉiu homo parolus same[23], neniu lernus Esperanton. Sed se ĉiu homo lernus Esperanton, ĉiuj homoj komprenus sin...

TAGMANĜO[24]



Estas tagmezo[25]. Ĉiuj familianoj estas en la manĝoĉambro. Hodiaŭ ili ne laboras, ĉar estas dimanĉo. La familianoj sidas ĉirkaŭ la tablo kaj ili baldaŭ[26] tagmanĝos.

Dekstre[27] sidas la patro kaj maldekstre, kontraŭ la patro, sidas la avo. Peter sidas apud Maria kaj kontraŭ ili sidas la avino. La patrino alportas[28] la manĝojn sur la tablon. Sur la tablo estas blanka tablotuko[29]. Antaŭ ĉiu familiano kuŝas buŝtuko, manĝilaro kaj du teleroj: unu por supo[30] kaj la alia por la dua manĝo.

“Maria, ĉu vi scias, kion ni hodiaŭ tagmanĝos?” – demandas Peter. – “Jes, mi scias. Por la tagmanĝo estos legoma[31] supo, terpomoj[32], brasiko[33] kaj viando[34]. Poste ni manĝos kukojn[35] kaj fruktojn.” Kiam estas ĉio preta[36], ili komencas manĝi. Unue ili manĝas supon. Maria ne ŝatas legoman supon, sed la patrino diras al ŝi: “Prenu almenaŭ[37] iom, por ke vi ne estu malsata!” Ĉiuj manĝas kun granda apetito. Post la manĝo ili prenas ankoraŭ fruktojn kaj kukojn. La gepatroj trinkas tason da nigra kafo. Iom da tempo ili ankoraŭ sidas ĉirkaŭ la tablo kaj babilas pri diversaj[38] aferoj[39]. Estas bela vetero kaj tial ili iras al la ĝardeno. En la ĝardeno estas kelkaj benkoj, kie oni povas sidi, babili aŭ ripozi. Estas aŭtuno kaj en la ĝardeno maturiĝas diversaj fruktoj. Se iu volas manĝi pomojn, pirojn[40] aŭ prunojn[41], li povas preni iom ajn el la ĝardenaj fruktoarboj.

Memoru:

Mi havas nenion por manĝi. *Saya tidak punya apa pun untuk dimakan.* Mi venis por vidi vin. *Saya datang untuk menemui kamu.* Ni lernas, por ke ni sciu. *Kita belajar agar kita tahu.* Diru al ŝi, ke ŝi eksidu. *Beritahu dia untuk duduk.*

maldekstre

havas en la manoj kaj iras

portas



tablotuko



buŝtuko



supo

legomoj

terpomoj

brasiko



viando

kuko

jam estas, oni faris ĝin

preta

ne malpli ol

almenaŭ

multaj malsamaj, ĉiu estas alia

diversaj

tio, pri kio ni parolas

afero

piro

prunoj

Respondu la demandojn:

Ĉu vi ŝatas legoman supon? Kion vi havis hieraŭ por la tagmanĝo? Por kio ni lernas? Por kio ni manĝas? Kion vi farus, se vi havus flugmaŝinon?

GRAMATIKO

Por ke ...-u Por ...-i Ke ...-u

Donu al mi plumon, **por ke** mi pov**u** skribi. *Berikanlah saya pena agar saya bisa menulis.* Ni lernas, **por ke** ni sci**u**. *Kita belajar agar kita tahu.*

Gabungan **ke** + *bentuk perintah digunakan untuk menunjukkan tujuan suatu perbuatan.*

Ni lernas, por ke ni sciu = Ni lernas por scii. Ni ne vivas, por ke ni manĝu = ni ne vivas por manĝi. *Dalam beberapa kasus (jika kedua klausa mempunyai subjek yang sama) bentuk "***por ke** + *perintah" boleh disingkat menjadi "***por** + *infinitif".*

Ni volas, ke vi laboru. *Kami mau kamu bekerja.* Diru al li, ke li eksidu. *Beritahu dia untuk duduk. Pengharapan atau perintah boleh secara tidak langsung diungkapkan dengan menggunakan konjungsi* **ke**.(Mi volas, ke vi laboru = Mi volas: *"*Vi laboru!*").*

-us

Mi leg**us**, se mi havus libron. *Saya akan membaca jika saja saya punya buku*. Se mi est**us** sana, mi est**us** feliĉa. *Jika saja saya sehat, saya akan bahagia. Bentuk kondisional (pengandaian) berakhiran* **-us**.

Bentuk-bentuk kata kerja:

Est
- **-i** *infinitif*
- **-is** *kala lampau*
- **-as** *kala kini (adalah)*
- **-os** *kala mendatang (akan)*
- **-us** *kondisional/pengandaian*
- **-u** *imperatif/perintah*

Kosakata:

1 – untuk, 2 – orang, 3 – tamu, 4 – untuk menemuimu, 5 – untuk makan, 6 – untuk hidup, 7 – sehingga saya dapat, 8 – mengerti, 9 – kamu bekerjalah, 10 – melalui, 11 – terowongan, 12 – (telah) masuk, 13 – (telah) keluar, 14 – (telah) membaca keseluruhan, 15 – sekitar, 16 – melawan, 17 – akan membaca, 18 – jika, 19 – uang, 20 – kaya, 21 – pesawat, 22 – ladang, 23 – sama, 24 – makan siang, 25 – tengah hari, 26 – segera, 27 – di sebelah kanan, 28 – membawa, 29 – taplak meja, 30 – sup, 31 – sayur, 32 – kentang, 33 – kubis, 34 – daging, 35 – kue, 36 – siap, 37 – setidaknya, 38 – beragam, 39 – hal, 40 – buah pir, 41 – buah plum.

16 DEK-SESA LECIONO

-on-

1/2	**1/3**	**2/3**	**3/4**
du**ono**[1]	triono	du trionoj	tri kvaronoj

Kioma horo estas?

07:15
Estas la sepa kaj kvarono.

08:45
Estas la oka kaj tri kvaronoj.

04:30
Estas la kvara kaj duono.

Kvar estas duono de ok. Du estas triono de ses. Kiom estas duono de dek du? Komenco bona, laboro duona. Kio estas duonhoro?

HORLOĜO

Kio estas horloĝo? – Horloĝo estas ilo por mezuri[2] la tempon. La horloĝo havas du montrilojn: longan kaj mallongan. La longa montrilo montras minutojn, la mallonga montras horojn. Kelkaj horloĝoj havas ankoraŭ unu montrilon, kiu montras sekundojn[3]. Estas ankaŭ elektraj[4] horloĝoj, kiuj ne havas montrilojn. Horloĝoj estas diversaj. Sur la turo[5] de preĝejo[6] estas turhorloĝo. Hejme ni havas grandan murhorloĝon. Sur la antaŭbrako[7] ni portas brakhorloĝon. Matene nin vekas vekhorloĝo. Ĉu vi scias, kio estas sunhorloĝo? Kian horloĝon vi havas? Kioman horon ĝi montras?

Po

La patrino donis al la infanoj **po**[8] du pomoj. (Ŝi donis al ĉiu infano du pomojn.) La homo havas sur ĉiu mano po kvin fingroj. Mi legas la libron po dek paĝoj ĉiutage. La gastoj



montriloj



preĝejo



turo

turhorloĝo



murhorloĝo

brako



brakhorloĝo

vekhorloĝo

30 minutoj

duonhoro

ekscii per ilo, kiom longa, alta... io estas

mezuri



po du



duopo (paro)

eltrinkis po du glasoj da vino[9]. La soldatoj staras po kvin en ĉiu vico[10]. En la klaso staras tri vicoj po du benkoj. Ni lernas ĉiutage po kvin horoj. Po kiom da horoj vi lernas?

-op-

Kio estas du**opo**[11]? – Duopo estas du homoj aŭ du objektoj kune. Duopo estas paro[12]. Kio estas triopo? – Triopo estas tri homoj aŭ tri objektoj kune. La lernantoj iras po du. Ili iras duope (en duopoj). La soldatoj iras kvarope (po kvar). En la parko promenis duopoj. Nia familio ĉiam vespermanĝas kvarope. Ni iris unuope (po unu).

-ad-

En la ĝardeno longe bojis hundo. Ni aŭskultis ĝian boj**ad**on[13]. Antaŭhieraŭ mi ricevis leteron, hieraŭ mi ricevis leteron, hodiaŭ mi ricevis leteron... – ĉiutage mi ricevadas leteron. De longa irado min doloras[14] la piedoj. Li longe legis. De longa legado lin doloras la okuloj. Ŝi ŝatas bicikladon kaj naĝadon. Ĉu la hodiaŭa instruado estis interesa?

-obl-

2 x 3 = 6

Du**obl**e[15] tri estas ses.

Duoble kvar estas ok. Trioble kvin estas dek kvin. En nia lernejo estas duoble pli da lernantoj ol en via lernejo. Hodiaŭ mi faris duoblan laboron. Ni havas kelkoble pli da mono ol vi. Kiu donas rapide, donas duoble.
Kiom estas 3 x 3, 4 x 3, 4 x 4, 2 x 6?

-foje

Unu**foje**[16]

Du**foje**

Kiom**foje**? – Unufoje, dufoje, trifoje, kvarfoje, ... multfoje.

Oni povas morti[17] nur unufoje. Dufoje mezuru, unufoje tondu! Mi trifoje kisis mian patrinon. Ĉiufoje, kiam mi estis ĉe vi, vi ne estis hejme. Venu alian fojon! Faru tion ankoraŭfoje! Mi jam dufoje diris al vi, ke vi devas pli bone lerni. Kelkfoje mi vidis tiun homon. Vivis foje reĝo[18] kaj li havis tri filojn.

EKSKURSO[19] AL LA NATURO[20]

Foje diris la instruistino al la lernantoj: "Hodiaŭ ni faros ekskurson al la naturo!" Ĉiuj infanoj ĝojis[21]: estas bela vetero kaj estas pli agrable[22] ekskursi, ol sidi en la klaso.

Kiam ili eliris el la lernejo, estis la oka horo kaj duono. La unua iris la instruistino. La lernantoj iris duope post ŝi. Unue ili ĉirkaŭiris[23] malgrandan arbaron, kiu estas apud la lernejo. Poste ili iris tra la kampoj kaj haltis[24] ĉe malgranda rivero[25].

"Ĉu vi scias, kie ni estas?" – demandis la instruistino.

"Jes, en la naturo" – respondis iu lernanto. – "Kaj ĉu vi scias, kio estas la naturo?" – "La naturo estas ĉio ĉirkaŭ ni, kion ne faris la homo: akvo, aero[26], tero[27], plantoj[28] kaj animaloj[29]..." – respondis alia lernanto. – "Jes, bonege!", diris la instruistino. "La naturo estas belega kaj ni ne povus vivi sen ĝi."

Estas bela printempa tago. La suno brilas kaj blovas[30] varmeta vento[31]. La infanoj kuras sur la herbejo[32] kaj kolektas[33] florojn.

ANEKDOTO

La lernantoj lernas pri la sezonoj. La instruistino demandas knabon en la unua benko:

"Ĉu vi scias, kiam oni kolektas fruktojn?" – "Kiam en la ĝardeno ne estas hundo", respondis la lernanto.

MEMORU:

-ON-	-OBL-
5 estas duono de 10	10 estas duoblo de 5
10 estas dekono de 100	100 estas dekoblo de 10
3 estas triono de 9	9 estas trioblo de 3

ofte aŭ longe
...-i
-adi

doloras



duobla, triobla
fini la vivon
morti

reĝo
longa promeno
ekskurso
ĉio ĉirkaŭ ni
naturo
esti feliĉa
ĝoji
bona por ni
agrabla

fini iri

halti

rivero

birdoj flugas en ĝi

aero

ni iras sur ĝi

tero

herbo

arboj, floroj kaj herboj

plantoj

bestoj kaj homoj

animaloj



blovas



vento

kolekti

Memoru:

Ni iris unuope**.** *Kami pergi sendiri-sendiri.*
Faru tion ankoraŭfoje. *Kerjakan itu sekali lagi.*

Respondu:

Kion diris foje la instruistino al la lernantoj? Kiam ili eliris el la lernejo? Kion ili ĉirkaŭiris? Kie ili poste haltis? Kio estas naturo? Kio estas horloĝo? Kiajn montrilojn havas horloĝo? Kiajn horloĝojn vi konas? Ĉu la lernantoj en via klaso sidas unuope? Ĉu vi ofte ricevadas leterojn? Ĉu vi legis iun libron dufoje? Kiom estas trioble kvar? Kioma horo estas nun?

GRAMATIKO

-on- Du**on**o, tri**on**o, kvar**on**o. *Setengah/separuh, sepertiga, seperempat. Pecahan dibentuk dengan akhiran* **-on-**.

-op- Du**op**o, tri**op**o, kvar**op**o.... *Berdua, bertiga, berempat. Dengan akhiran* **-op-** *kita membentuk bilangan kumpulan.*

-obl- Du**obl**e kvar estas ok. *Dua kali empat adalah delapan.* Du**obl**a – *Dua kali lipat.* Tri**obl**a – *Tiga kali lipat. Dengan akhiran* **-obl-** *kita membentuk bilangan penggandaan/kelipatan.*

-ad- Leg**ad**i, ir**ad**i, skrib**ad**i. *Membaca-baca, pergi-pergi, menulis-nulis.*

Akhiran **-ad-** *menunjukkan pengulangan atau kelanjutan suatu perbuatan.*

Kosakata:

1 – setengah, 2 – mengukur, 3 – detik, 4 – elektris, 5 – menara, 6 – gereja, 7 – lengan, 8 – masing-masing, 9 – anggur (minuman), 10 – barisan, 11 – berdua, 12 – pasangan, 13 – menggonggong, 14 – menyakiti, 15 – dua kali lipat, 16 – satu kali, 17 – mati, 18 – raja, 19 – ekskursi, 20 – alam, 21 – senang, 22 – menyenangkan, 23 – (telah) mengitari, 24 – (telah) berhenti, 25 – sungai, 26 – udara, 27 – bumi, 28 – tanaman, 29 – hewan, 30 – bertiup, 31 – angin, 32 – (tanam) rumput, 33 – mengumpulkan.

17 DEK-SEPA LECIONO

Rigardi – Vidi

Maria rigardas
el la fenestro
kaj vidas hundon.

Aŭskulti – Aŭdi

Peter aŭskultas radioaparaton[1]
kaj aŭdas[2] muzikon[3].

Paroli – Diri

Tiu viro parolas, sed ni ne
komprenas lin. Ni ne scias,
kion li diras, ĉar li
ne parolas Esperante.

Mi rigardas, sed mi vidas nenion. Rigardu: ĉu vi vidas tiun birdon? Mi aŭskultas, sed mi aŭdas nenion. Mi aŭdis bonan anekdoton: aŭskultu, mi diros ĝin al vi. Tiu virino multe parolis, sed malmulte diris.

Rigardi = voli vidi. Aŭskulti = voli aŭdi. Paroli = voli diri.

-aĵ-

Aĵo[4] estas objekto aŭ afero. Skribaĵo estas tio, kion mi (aŭ iu alia) skribis. Legaĵo estas tio, kion ni povas legi. Novaĵo estas io nova, pri kio ni ankoraŭ ne aŭdis. Trinkaĵo estas tio, kion ni povas trinki. Akvo, limonado, kafo, biero, vino kaj lakto estas trinkaĵoj. Biero kaj vino estas alkoholaĵoj. Kio estas manĝaĵo? – Ĉio, kion ni povas manĝi. Ĉokolado, bombono[5], kuko kaj sukero[6] estas dolĉaj[7] – ili estas dolĉaĵoj (sukeraĵoj). Infanoj ŝatas dolĉaĵojn. Kio estas ĉirkaŭaĵo, azenaĵo, bovaĵo, malagrablaĵo?



radioaparato



aŭdas

muziko

objekto aŭ afero

aĵo

io nova

novaĵo

io por trinki

trinkaĵo

sukero

bona kiel sukero

dolĉa

io dolĉa

dolĉaĵo

kial?

pro kio?



alteco

riĉa homo

riĉulo

tiu, kiu multe scias

saĝa

malsaĝa

stulta

ie malproksime

for

per la nazo ni spiras

spiri

sen tio, plie

krom

nur unu, sen aliaj

sola

devas havi

bezonas

ankaŭ ne

nek

ne tute, sed mankas malmulte

preskaŭ

Pro

Pro[8] kio ŝi ploras? Ŝi ploras, ĉar ŝi estas malfeliĉa. Pro kio vi venis? Pro tio, ĉar mi volis vidi vin. Pro unu arbo li arbaron ne vidas. Pro kio vi ridas? Pro tio, ĉar mi aŭdis bonan anekdoton. Li amas tiun knabinon pro tio, ke ŝi estas bona kaj bela.

PRO KIO = KIAL PRO TIO = TIAL

-ec-

Eco[9] de bona homo estas boneco. Eco estas kvalito de io. Mi amas vin pro via bel**ec**o (via eco estas, ke vi estas bela). Kian altecon vi havas? En unueco estas forto. Vivu[10] la amikeco! Inter infaneco kaj matureco estas juneco. Mi ŝatas belecon kaj purecon. Ecoj: bona, bela, alta, granda, agrabla...

-ul-

Bon**ul**o[11] estas bona homo. Riĉulo estas riĉa homo, kiu havas multe da mono. Malriĉulo havas malmulte da mono. Homo, kiu havas altan aĝon, estas altaĝulo (maljunulo). Malsana homo estas malsanulo. Bela knabino estas belulino. Ĉu vi scias, kio estas malsanulejo[12]? Karulo estas homo, kiun ni amas kaj kiu estas al ni kara. Saĝa[13] homo (kiu multe scias) estas saĝulo kaj malsaĝa (stulta) homo estas malsaĝulo (stultulo). Homoj, kiuj estas kun ni, estas niaj kunuloj kaj homoj, kiuj estas kontraŭ ni, estas niaj kontraŭuloj.

For

Estas **for**[14] = estas ie malproksime, ne ĉi tie.
Iru for = iru de ĉi tie, sur alian lokon.

Mi ne loĝas kun miaj gepatroj: mi loĝas for de miaj gepatroj. Miaj geamikoj jam iris for. Ili jam foriris. La vagonaro forveturis antaŭ kvin minutoj. Kiu hodiaŭ forestas? For de la okuloj, for de la koro.

LA VIVO DE LA HOMO

Ĉiu homo devas manĝi, trinki kaj spiri[15]. Krom[16] tio la homo devas labori, ripozi kaj dormi. La homo ne povas vivi sola[17]. Li bezonas[18] amikojn, kiuj komprenas kaj amas lin.

Kiam Peter naskiĝis, li estis tute malgranda. Li trinkis nur la patrinan lakton. Li ne sciis paroli, nek[19] iri. Preskaŭ[20] ĉiam li dormis. Li suĉis[21] la patrinan lakton: li estis suĉinfano[22] (bebo). Sed la tempo pasis[23] kaj Peter kreskis[24]. Li lernis manĝi, iri kaj paroli. Kiam li estis trijara, li jam kuradis tra la loĝejo, mem[25] vestadis sin kaj komencis vizitadi[26] infanĝardenon[27]. Tie li ludadis kun aliaj infanoj kaj ĝojis, ke li baldaŭ fariĝos lernanto.

Forpasis[28] kelkaj jaroj kaj Peter estas lernanto. Nun li jam vizitadas la 7-an klason. Ĉiutage li lernas pri interesaj aferoj. Peter baldaŭ finos la lernejon kaj fariĝos studento[29]. Lia infaneco estos for. Li estos junulo (fraŭlo[30]) kaj poste matura homo. Li eble edziĝos[31] kaj havos proprajn[32] infanojn, pri kiuj li zorgos[33], kiel nun zorgas pri li liaj gepatroj.

PROVERBOJ

Malbona novaĵo rapide kuras. Saĝulo scias ion, sed neniu scias ĉion. Riĉulo veturas, malriĉulo kuras. Juneco ne scias – maljuneco ne povas. For de la okuloj – for de la koro[34]. Dum la manĝado venas apetito. Pli bona estas saĝa malamiko, ol malsaĝa amiko. Pli bone zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino.

EN ZOOLOGIA[35] ĜARDENO (ZOO)



Kion dirus ĉi tiu tigro, se ĝi scius paroli?

– Antaŭ ĉio ĝi dirus, ke ĝi ne estas tigro, sed – leono[36].

trinki lakton de la patrino

suĉi

suĉinfano (bebo)

ĉiam iri

pasi

grandiĝi

kreski

nur li sola

mem

iri en iun lokon

viziti

lernejo por malgrandaj infanoj

infanĝardeno

juna viro

junulo

la patro estas la edzo de la patrino

edzo

nur mia (lia, ŝia...)

propra

labori ĉirkaŭ infano

zorgi



koro



leono

Memoru:

Ŝi ne venis pro malbona vetero. *Dia tidak datang karena cuaca buruk.* Tio estas floroj por vi. *Ini adalah bunga-bunga untukmu.* **Pro** *menyatakan alasan atau sebab,* **por** *menyatakan tujuan objek.*

Respondu kaj la respondojn skribu:

Kio estas: skribaĵo, legaĵo, novaĵo, trinkaĵo, ĉirkaŭaĵo, stultaĵo? Kian altecon vi havas? Kio estas inter infaneco kaj matureco? Kio estas: bonulo, belulino, malsanulo, malsanulejo?

Rakontu anekdoton en Esperanto!

Diru kelkajn proverbojn!

GRAMATIKO

-aĵ- Nov**aĵ**o, trink**aĵ**o, dolĉ**aĵ**o. *Berita, minuman, manisan/gula-gula. Nama untuk objek atau benda yang memiliki suatu kualitas tertentu dibentuk dengan sufiks* **-aĵ-**.

-ec- Bel**ec**o, bon**ec**o, jun**ec**o. *Kecantikan, kebaikan, kemudaan. Sufiks* **-ec-** *memberi arti kualitas atau karakteristik.*

-ul- Riĉ**ul**o, kar**ul**o, saĝ**ul**o. *Orang kaya, orang tersayang, orang bijaksana. Sufiks* **-ul-** *mengindikasikan seseorang dengan suatu kualitas atau karakteristik tertentu.*

Kosakata:

1 – radio, 2 – dengar, 3 – musik, 4 – sesuatu, 5 – permen, 6 – gula, 7 – manis, 8 – sebab, karena, 9 – kualitas, 10 – hidup, 11 – orang baik, 12 – rumah sakit, 13 – bijaksana, 14 – jauh, 15 – bernafas, 16 – selain itu, 17 – sendiri, 18 – butuh, 19 – tidak, 20 – hampir, 21 – di sini: menyusu; juga: menyedot, menghisap, mengempeng, 22 – bayi, 23 – lewat, 24 – bertumbuh, 25 – (oleh) diri sendiri, 26 – kunjungan rutin, 27 – taman kanak-kanak, 28 – wafat/meninggal, 29 – murid, 30 – bujang, 31 – menikah, 32 – milik sendiri, 33 – merawat/menjaga, 34 – hati, 35 – kehewanan, 36 – singa.

18 DEK-OKA LECIONO

Kvankam Tamen

Kvankam[1] brilis la suno, tamen[2] estis malvarme.
(Ankaŭ se brilis la suno, kontraŭ tio estis malvarme.)
Kvankam li estas riĉa, tamen li ne estas feliĉa.
Kvankam mi aŭskultas, tamen mi nenion aŭdas: estas silento[3]. Kvankam mi rigardas, tamen mi nenion vidas: estas mallumo. Kvankam li estas juna, tamen li estas saĝa.

-em-

Estas **em**a[4] (**em**as) = ŝatas, volas ion fari.
Labor**em**a homo ŝatas kaj volas labori. Tiu, kiu timas[5], estas timema. Ĉu vi estas dormema? – Ne, mi dormis sufiĉe[6]! Infanoj ŝatas ludi. Ili estas ludemaj. Ĉu vi estas ŝparema[7]?

-ebl-

Eble[8] = povas esti, ke jes, aŭ ne.
Estas ...-**ebl**a = oni povas ĝin ...-i.
Videbla estas tio, kion ni povas vidi. Aŭdebla estas tio, kion ni povas aŭdi. Tiu letero ne estas legebla. Ĉu tiu akvo estas trinkebla? Mi ne kredas[9], ĉar tio estas nekredebla. Tio ne estas ebla (tio ne povas esti). Eble mi venos, ankoraŭ mi ne scias. Tra fenestro ni vidas, ĉar vitro[10] estas travidebla.

Re-



Refoje[11] = ankoraŭfoje, denove. Reskribi = skribi ankoraŭfoje, la duan fojon. Reveni = veni al la sama loko, kie ni estis. Ĝis revido! Kiam vi revenos? Kiam vi redonos al mi la libron, kiun mi pruntis[12] al vi?

Dis-



Disiri[13] = iri al diversaj lokoj. Disdoni = doni al diversaj homoj. Disdonu la librojn! La birdoj disflugis. Distranĉu la kukon! Leterportisto disportas leterojn kaj bildkartojn. Peter disdonis bombonojn.

ankaŭ se
kvankam
kontraŭ tio
tamen
kiu ŝatas labori
laborema
pensi, ke estos malbone
timi



dormema
tiom, kiom ni bezonas
sufiĉe
kolekti monon
ŝpari
tio, kion ni povas vidi
videbla
povas esti ke jes
eble
el ĝi estas glaso, botelo kaj fenestro
vitro
ankoraŭfoje, la duan fojon
refoje

doni por ia tempo

prunti



reveni

iri al diversaj lokoj

disiri

ricevi kontraŭ mono

aĉeti

doni kontraŭ mono

vendi

loko, kie ni povas aĉeti

vendejo

granda vendejo

magazeno

veni unu al la alia

renkonti

tial, sekve

do

korbo

EN LA MAGAZENO[14]

Hodiaŭ matene diris al mi la patrino: "Mi petas, iru en la magazenon kaj aĉetu[15] kelkajn manĝaĵojn! Aĉetu du litrojn da lakto, buteron, panon kaj fruktojn!" Antaŭ la domo mi renkontis[16] mian amikon, Roberton. Ankaŭ li iris al la sama magazeno, do[17] ni iris kune. En la magazeno mi prenis aĉetkorbon[18] kaj serĉis tion, kion la patrino deziras. Baldaŭ mi trovis[19] ĉion. Mi rememoris[20], ke ni hejme ne havas sukeron, do mi aĉetis ankaŭ ĝin. Poste mi helpis al Robert serĉi[21] tion, kion li volis aĉeti: fromaĝon, nigran kafon, limonadon kaj botelon da biero por la patro. Longe ni serĉis fruktojn, sed ni ne povis trovi ilin. Tial ni demandis la vendistinon[22]: "Kie troviĝas la fruktoj?" – "Fruktoj ne estas aĉeteblaj en ĉi tiu magazeno", respondis la vendistino. "Vi devas viziti la apudan vendejon". Ni do pagis[23] kaj ambaŭ[24] iris al la fruktovendejo. – "Kiom kostas[25] ĉi tiuj pomoj?" – mi demandis kaj montris per la fingro al belaj ruĝaj pomoj. "Unu kilogramo kostas dudek kronojn[26]", afable[27] respondis la vendistino. Ni ambaŭ aĉetis po du kilogramoj da pomoj. Poste ni revenis hejmen. Antaŭ nia domo ni disiris, ĉar Robert loĝas en alia domo. "Vi forgesis[28] diri al mi, ke mi aĉetu ankaŭ sukeron", mi diris al la patrino, kiam ŝi malfermis la pordon. "Jes, mi tute forgesis pri tio. Bone, ke vi rememoris", ŝi respondis.

LA HOMA KORPO

Hodiaŭ ni lernis pri la homa korpo. La instruistino desegnis[29] sur la tabulo bildon de la homa korpo kaj diris:

„La homa korpo havas tri ĉefajn[30] partojn[31]: kapon, trunkon[32] kaj membrojn[33]. Sur la kapo estas haroj kaj vizaĝo[34]. Sur la vizaĝo troviĝas frunto[35], du okuloj, du oreloj, nazo, buŝo, du vangoj[36] kaj mentono[37]. En la buŝo estas dentoj kaj lango[38]. Inter la kapo kaj la trunko estas kolo. Sur la trunko estas brusto[39], ventro[40] kaj dorso[41]. En la maldekstra flanko[42] de la brusto estas koro. La homo havas kvar membrojn: du brakojn kaj du krurojn[43]. La brako finiĝas per mano kaj la kruro finiĝas per piedo. Sur la manoj kaj sur la piedoj estas po kvin fingroj.

Poste la instruistino demandis: "Ĉu vi scias, kion ni faras per la unuopaj korpo-partoj?" – La infanoj respondis unu



post la alia: “Per la kapo ni pensas.” “Per la okuloj ni rigardas.” “Per la oreloj ni aŭskultas.” “Per la buŝo ni manĝas, parolas kaj kantas[44].” “Per la nazo ni spiras.” “Per la kruroj ni iras, kuras, dancas kaj – ludas futbalon.” “Per la fingro ni montras kaj per la koro ni amas...” – “Kaj kion ni faras per la kolo?” demandis la instruistino. “La kolon ni devas ĉiuvespere lavi”, respondis iu knabo.

Memoru:

Infanoj estas ludemaj. *Anak-anak suka bermain.* La vitro estas travidebla. *Kaca itu adalah transparan.* Iru reen! *Kembalilah!* Eble. *Mungkin.* Kiam vi revenos? *Kapan kamu akan kembali?*

Respondu:

Ĉu la koro estas aŭdebla? Ĉu katidoj estas ludemaj? Ĉu vi ofte aĉetas? Kio estas aĉetebla en magazeno? Kiom kostas unu kilogramo da sukero? Ĉu ĉiuj vendistinoj estas afablaj? Per kiu mano vi skribas?

Desegnu sur la tabulon la homan korpon kaj skribu al la unuopaj korpopartoj, kiel ili nomiĝas.

ekvidi, ekhavi

trovi

voli trovi

serĉi

ankoraŭ scii, havi en la kapo

memori

trovi en la memoro

rememori

esti en iu loko

troviĝi

doni monon

pagi

ĉiuj du kune

ambaŭ

esti aĉetebla je ... kronoj

kosti

slovaka mono

krono

per belaj vortoj, kun rideto

afable

skribi bildon

desegni

supera

ĉefa

la tuto estas el partoj

parto

kruroj kaj brakoj; anoj

membroj

dekstra aŭ maldekstra parto

flanko

kanti

GRAMATIKO

-em-

Labor**em**a, dorm**em**a, tim**em**a, ŝpar**em**a.
Rajin, ngantuk, penakut/pemalu, hemat.

Sufiks ***-em-*** *memiliki arti kecendrungan akan sesuatu.*

-ebl-

Vid**ebl**a, manĝ**ebl**a, leg**ebl**a, travid**ebl**a, nekred**ebl**a.
Dapat dilihat, dapat dimakan, dapat dibaca, transparan, tak dapat dipercaya.

Sufiks ***-ebl-*** *menyatakan kemampuan atau kesesuaian pada sesuatu.*

Re-

Reskribi, **re**memori, **re**veni, **re**doni, **re**en.
Menulis lagi, mengingat lagi, datang lagi, memberi lagi, masuk lagi.

Prefiks ***re-*** *berarti: a) pengulangan suatu kegiatan; b) kebalikan, reaksi.*

Kosakata:

1 – meskipun, 2 – masih, namun, 3 – diam, kesunyian, 4 – kecendrungan, 5 – takut, 6 – cukup, 7 – hemat, 8 – mungkin, 9 – percaya, 10 – kaca, 11 – lagi, 12 – (telah) pinjam, 13 – menyebar, 14 – toko, 15 – beli, 16 – (telah) bertemu, 17 – jadi, 18 – keranjang belanja, 19 – (telah) dapat, 20 – (telah) ingat, 21 – cari, 22 – penjual (perempuan), 23 – (telah) bayar, 24 – dua-duanya, 25 – berharga/berbiaya (kiom kostas? = *berapa harganya?*), *26 – krone/krona/koruna, 27 – ramah, 28 – (telah) lupa, 29 – (telah) mendesain, 30 – utama, 31 – bagian, 32 – batang, 33 – anggota, 34 – wajah/muka 35 – kening, 36 – pipi, 37 – dagu, 38 – lidah, 39 – dada, 40 – perut, 41 – punggung, 42 – sisi, 43 – kaki, 44 – menyanyi.*

19 DEK-NAŬA LECIONO

-ant-

Peter estas lern**ant**o.
Li sidas kaj lernas.
Kia estas Peter?
– Sid**anta**[1] kaj lern**anta**.
Kiel lernas Peter?
Li lernas sid**ante**[2].

-at-

Maria sidas kaj legas.
Antaŭ ŝi estas libro.
Kia estas Maria?
– Sid**anta** kaj leg**anta**.
Kia estas la libro?
La libro estas leg**ata**[3].

Skribanto estas tiu, kiu skribas. Leganta homo (leganto) estas tiu, kiu legas. En la rivero fluas[4] akvo. La akvo estas fluanta. Fluanta akvo estas pli pura ol akvo staranta. Mi manĝas pomon: mi estas manĝanta kaj la pomo estas manĝata. La patrino lavas infanon; ŝi estas lavanta kaj la infano estas lavata. Trinkante kafon mi legis gazeton. Tio estas mia ŝatata manĝaĵo. Tiun homon mi konas[5], li estas mia konato.

Bo-

Mia frato Daniel edziĝis. Lia edzino havas patron kaj fraton. Ŝia patro nun estas la **bo**patro[6] de Daniel kaj ŝia frato estas lia **bo**frato. Ĉu via patro amas sian **bo**patrinon? **Bo**filo estas edzo de la filino. Daniel nun estas **bo**filo de sia **bo**patro.

-estr-

Estro[7] estas ĉefo aŭ direktoro. Ĉefo de urbo estas urb**estr**o. Ĉefo de stacio[8] estas staci**estr**o. Direktoro de lernejo estas lernej**estr**o. Sur ĉiu ŝipo[9] estas ŝip**estr**o. Kio estas hotel**estr**o, vendej**estro**, ŝtat**estr**o, **estr**aro?

leganta



legata

fluas

memoras la vizaĝon

konas

patro de la edzo/edzino

bopatro

haltejo de vagonaro

stacio

ĉefo, direktoro

estro



ŝipo

urbeto, kelkaj domoj

vilaĝo

doni ion sur iun lokon

meti

sukerujo



supujo



abelo, abelujo

salujo



monujo

homo el la sama familio

parenco

-uj-

La sukero estas en suker**uj**o[10].



La supo estas en supujo.

La patrino metis[11] sur la tablon supujon, sukerujon kaj salujon[12]. Abeloj[13] vivas en abelujoj. Ĉu vi ne vidis mian monujon?

– "Panjo, aĉetu por mi monujon!"
– "Aĉetu ĝin mem!"
– "Sed mi ne havas monon!"
– "Do vi ne bezonas monujon!"

LA PARENCOJ[14]

Ankoraŭ vi ne konas ĉiujn membrojn de nia familio. Vi jam konas miajn gepatrojn kaj geavojn. Sed nia familio havas ankoraŭ aliajn membrojn: la parencojn.

Frato de mia patrino estas mia onklo[15]. Li estas bofrato de mia patro. Mia onklo estas staciestro. La avo estas la patro de mia patro. Li estas la bopatro de mia patrino. Mi estas lia nepo[16]. La patrino estas bofilino de mia avo. Filo de mia onklo estas mia kuzo[17].

La onklo kaj la kuzo ofte vizitas nin. Dum[18] la onklo babilas kun la gepatroj, la kuzo Robert ĉiam ludas kun mi. Fratino de mia patro estas mia onklino. Ŝi estas vidvino[19]. Antaŭ du jaroj mortis ŝia edzo kaj ŝi restis sola. Frato de mia patro, la onklo Martin, ankoraŭ ne havas edzinon. Li estas fraŭlo, sed li havas fianĉinon[20] kaj baldaŭ edziĝos.

PROVERBOJ

Ne ĉio brilanta estas diamanto. Dormantan hundon ne veku! Li estas preskaŭ mia frato: nepo de onklo de konato. En abelujon ne blovu! Eliris ridante, revenos plorante. Forveturis azenido, revenis azeno.

EN LA VILAĜO[21]

Finiĝas la semajno kaj antaŭ ni estas semajnofino[22]. Peter kaj Maria decidis[23] viziti siajn geavojn. Ili vivas en vilaĝo. La vilaĝo ne estas granda. Ĝi havas nur kelkajn stratojn.

La geavoj loĝas en simpla[24] dometo ĉe la fino de la vilaĝo. Antaŭ la domo estas ĝardeneto, plena de diversaj floroj. Sub la fenestroj estas benko. En la korto estas porkejo kun du porkoj. En la stalo[25] estas bovino. Ĉiutage ĝi donas al la geavoj freŝan[26] lakton. Malantaŭ la domo estas kamparo kaj arbaro.

Estas printempa mateno. La suno brilas pli kaj pli varme. La neĝo[27] malaperas[28] de sur la montoj. Sur la kampoj laboras maŝinoj. Maria kaj Peter iras tra la vilaĝo kaj ĝojas, ke ili baldaŭ revidos la geavojn. – Jen[29], tie ili sidas, antaŭ la dometo!

"Bonan matenon", krias[30] la infanoj. "Bonan matenon, gekaruloj", respondas la geavoj. "Ni havas por vi novaĵon: hodiaŭ nokte naskiĝis al nia bovino malgranda bovido!" La infanoj kuras al la stalo. "Kia ĝojo! Kia ĝojo!" Ili karesas[31] la bovidon kaj estas feliĉaj. Maria ne komprenas: la bovido naskiĝis nur antaŭ kelkaj horoj kaj jam ĝi staras.

Dum Maria ludas kun la bovido, Petro iras al la rivereto, kiu fluas malantaŭ la domo. Antaŭ unu jaro li tie kaptis[32] fiŝojn[33] kun siaj amikoj el la vilaĝo. Sed nun ĉe la rivereto estas neniu, ĉiuj estas for.

"Maria, ĉu vi volas helpi al ni?", demandas la avino. "Estas sabato kaj ni havas multe da laboro". "Jes, ni ambaŭ helpos", respondas Maria. Ĉiuj eklaboras. La avino kaj Maria faras ordon[34] en la kuirejo. Peter portas akvon al la ĝardeno. Poste ili helpos al la avo purigi la stalon.

Post la tagmanĝo la infanoj iris al la proksima arbaro. Babilante ili kolektis fungojn[35] kaj florojn. Hejmen ili revenis lacaj, sed feliĉaj. Sur la ĉielo[36] jam brilis la steloj[37] kaj la luno[38]. En la kuirejo atendis[39] ilin bona vespermanĝo. Maria kaj Peter ŝatas la vivon en la vilaĝo. Ĝi estas tute alia ol la vivo en la urbo.

frato de la patro/patrino

onklo

filo de la filo aŭ de la filino

nepo

la edzino de la filo

bofilino

filo de la onklo

kuzo

en la tempo de

dum

virino, al kiu mortis la edzo

vidvino

baldaŭ edzino

fianĉino

sabato kaj dimanĉo

semajnofino

pensi kaj diri: "tion ni faros"

decidi

normala, ne komplika

simpla

domo de bovinoj aŭ ĉevaloj

stalo

nova, bona

freŝa

blanka tero en vintro

neĝo

montri sin, fariĝi videbla

aperi

rigardu, tie!

jen!

forte paroli

krii

kun amo meti la manon

karesi

rapide preni

kapti



fiŝo

ĉio pura kaj sur sia loko

ordo

fungo

“plafono” super la tero

ĉielo

steloj



luno

Memoru:

Mi estas leganta kaj la libro estas legata**.** *Saya sedang membaca dan buku sedang dibaca.* Irante li fajfis. *Sambil berlalu dia bersiul.*

Respondu:

Kie vivas la geavoj de Peter kaj Maria? Kia estas la vilaĝo? Kiujn bestojn havas la geavoj? Kion faris la infanoj ĉe la geavoj? Kio estas skribanto, leganto, manĝanto, ŝatata manĝaĵo? Ĉu la ĉevaloj dormas kuŝante? Kies frato estas via onklo? Kies filino estas via kuzino? Ĉu vi havas bopatrinon?

GRAMATIKO

-ant- Leg**ant**a, manĝ**ant**a, sid**ant**a. *Sedang membaca, sedang makan, sedang duduk. Sufiks* **-ant-** *memiliki arti kegiatan yang sedang berlangsung.*

Lern**anto**, leg**anto**. *Pelajar, pembaca. Akhiran* **-o** *dengan* **-ant-** *mengindikasikan seseorang yang sedang melakukan kegiatan tertentu.*

Lern**ante**, sid**ante**. *Dengan sedang mempelajari, dengan sedang duduk. Partisip aktif dibentuk dengan gabungan* **-ant-** *dengan akhiran* **-e**.

-at- Leg**at**a, skrib**at**a, manĝ**at**a. *Sedang dibaca, sedang ditulis, sedang dimakan. Bentuk sifat dari partisip pasif kala kini dibentuk dari gabungan* **-at-**
dengan akhiran **-a**.

Kon**ato**, am**ato**. *Yang dikenal, yang disayang. Akhiran* **-o** *dengan* **-at-***mengindikasikan seseorang yang menjadi objek dari sesuatu.*

bo-

Bopatro, **bo**frato, **bo**filo. *Bapak mertua, saudara ipar laki-laki, menantu laki-laki. Awalan* **bo-** *memiliki arti hubungan keluarga yang disebabkan oleh pernikahan.*

-uj- Suker**uj**o, sal**uj**o, abel**uj**o. *Tempat gula, tempat garam, tempat lebah. Sufiks* **-uj-** *berarti suatu tempat untuk zat/benda yang diindikasikan dengan akar katanya.*

Kosakata:

1 – sedang duduk, 2 – dengan sedang duduk, 3 – sedang dibaca, 4 – mengalir, 5 – kenalan, 6 – bapak mertua, 7 – pemimpin, kepala 8 – stasiun, 9 – kapal, 10 – tempat gula, 11 – meletakkan, 12 – tempat garam, 13 – lebah, 14 – sanak saudara/kerabat, 15 – paman, 16 – cucu, 17 – sepupu, 18 – selama, 19 – janda, 20 – tunangan, 21 – kampung, 22 – akhir minggu, 23 – (telah) memutuskan, 24 – sederhana, 25 – kios, 26 – segar, 27 – salju, 28 – menghilang,29 – lihat!, 30 – berteriak, 31 – menyayangi, membelai, 32 – menangkap, 33 – ikan, 34 – pesanan/ perintah, 35 – jamur, 36 – langit, 37 – bintang, 38 – bulan, 39 – menunggu.

20 DUDEKA LECIONO

-ant- -int- -ont- -at- -it- -ot-

Li trink**os** bieron.
Ki**a** li estas?
– Trink**onta**[1].

Ki**a** estas la biero?
– Trink**ota**[3]**.**

Li trink**as** bieron.
Ki**a** li estas?
– Trink**anta**.

Ki**a** estas la biero?
– Trink**ata.**

Li trink**is** bieron.
Ki**a** li estas?
– Trink**inta**[2].

Ki**a** estas la biero?
– Trink**ita**[4]**.**

Mi skrib**os** leteron: mi estas skrib**ont**a; la letero estas skrib**ot**a.
Mi skrib**as** leteron: mi estas skrib**ant**a; la letero estas skrib**at**a.
Mi skrib**is** leteron: mi estas skrib**int**a; la letero estas skrib**it**a.

Mi legas libron. Mi estas leganta kaj la libro estas legata. Mi sidas kaj legas: mi legas sidante. Mi finis la legadon kaj metis la libron sur la tablon. La legita libro estas nun metita sur la tablo. La patrino diris al mi: "Metu la legitan libron en la ŝrankon!" En la ŝranko estas multaj libroj, kiujn mi jam legis: ili estas legitaj libroj. Sed tie estas ankaŭ libroj, kiujn mi ankoraŭ ne legis: ili estas nelegitaj libroj. Mi baldaŭ legos la librojn: ili estas legotaj.

PROVERBOJ

La tempo pasinta neniam revenos. Uzu[5] la tempon estantan, antaŭvidu la estontan kaj memoru la estintan. Ĝi malaperis kiel pasintjara neĝo. Hundo vivanta fartas pli bone ol leono mortinta. La manĝota fiŝo estas ankoraŭ en la rivero. Pri la mortintoj oni ĉiam bone parolas. Al fiŝo kuirita eĉ malvarma akvo ne helpos.

Kio estas: estinteco, estanteco, estonteco, pasinteco, malfermita, kaptito, venontjara, kolektanto, okazintaĵo[6]?

trinkonta

trinkanta

trinkinta

trinkota

trinkata

trinkita

fari ion per ilo: por skribi ni uzas plumon

uzi



malfermita libro

fariĝi

okazi

tio kio okazis

okazintaĵo

ne nur, sed ankaŭ

eĉ

kredo, ke io bona okazos

espero

luma, blanka

hela

nubo

sudo

kontraŭ tio

malgraŭ

inter blanka kaj nigra

griza

mondo

volas ĉion nur por si mem

egoista

feliĉa, ridetanta

gaja



flamo

Kanto de l' espero[7]

M.C. Butler

Meze de vintro malvarma
kantas ankoraŭ birdeto;
kaj en la nokto malhela[8]
lumas ankoraŭ steleto.

Meze de nigra nubaro[9]
brilas ankoraŭ la suno;
blovas la suda[10] venteto
malgraŭ[11] la griza[12] aŭtuno.

Meze de mond'[13] egoista[14]
batas la koro amanta;
meze de horo malgaja[15]
ridas espero flamanta[16].

SOMERO



Komenciĝas somero. En la ĝardenoj maturiĝas ĉerizoj[17]. Super la florantaj herbejoj ĝoje kantas birdoj. Laboremaj abeloj, flugante de floro al floro, kolektas dolĉan mielon[18]. El la blua[19] ĉielo ridetas la suno. Nur kelkaj nuboj naĝas unuope super la horizonto. Ĉiuj ĝojas, sed precipe[20] la infanoj: venis somero kaj proksimiĝas ferioj[21]!

Maria kaj Peter forlasas la urbon. Babilante ili iras sur kampara vojo[22]. Kien ili iras? – En proksiman arbaron, por kolekti maturiĝantajn fragojn[23].

Alveninte en la arbaron ili eksidis apud rivereto por ripozi. Peter rigardas la fluantan akvon. Ĝi estas klara[24] kaj sur la fundo[25] estas briletantaj ŝtonoj[26]. Maria, ekvidinte belajn fragojn, tute forgesis pri la laceco kaj tuj komencis kolekti ilin. Post kelkaj minutoj ili iris plu[27]. Trasaltinte[28] la rivereton

la infanoj malaperis en la arbaro. Kia agrabla ombro[29] kaj freŝa aero estas sub la branĉoj[30] de la arboj! Ili venis sur arbaran herbejon[31]. "Jen, rigardu!", ekkriis Maria, ekvidinte ruĝajn fragojn. Ŝi kolektas kaj manĝas ilin. Peter metas la fragojn en glason.

Kolektante la fragojn la gefratoj babilas pri la proksimiĝantaj ferioj. Unu monaton ili pasigos[32] ĉe la geavoj en la vilaĝo. Poste la tuta familio vojaĝos[33] al fremda[34] lando[35], en kiu la infanoj neniam estis: al Bulgario. Peter kaj Maria ankoraŭ ne vidis la maron[36]. Kompreneble ili tre ĝojas.

Babilante la infanoj eĉ ne rimarkis[37], ke iomete mallumiĝis kaj komencis blovi forta vento. Maria sentas[38], ke io falis[39] sur ŝian kapon. Pluvas[40]! La infanoj ekkuris kaj kaŝis[41] sin sub granda arbo. Starante sub la arbo ili atendos, ĝis[42] ĉesos pluvi. Poste ili revenos hejmen.

Se mi estus amata, mi estus feliĉa. Ĉio estas finita. Mi deziras, ke la laboro estu farita, kaj ne ke ĝi estu farota. Kiam mi eniris en la ĉambron, la patro estis leganta. Dormante ŝi ridetis. Kurante li falis. Mi tion faros volonte[43]. Mi estas baldaŭ forironta (= mi baldaŭ foriros).

Memoru:

Estonta tempo, estanta tempo, estinta tempo**.**
Masa depan, masa kini, masa lampau. Pasintjara neĝo. *Salju dari tahun lalu*. Proksimiĝantaj ferioj. *Liburan yang sedang datang mendekat.*

Respondu:

Kion faris Peter kaj Maria en la arbaro? Kio estis en la rivereto? Kion faros Peter kaj Maria dum la ferioj? Kion vi faros dum la ferioj?

GRAMATIKO

-ant- **-int-** **-ont-**

Leg**ant**a, leg**int**a, leg**ont**a. *Sedang membaca (kala kini), sedang membaca (kala lampau), sedang membaca (kala mendatang). Bentuk partisip aktif dapat berbentuk kala kini, kala lampau, atau kala mendatang.*



ĉerizoj

sukeraĵo de abeloj

mielo

ĉielkolora

blua

ĉefe, antaŭ ĉio

precipe

liberaj tagoj

ferioj

strato en kampoj

vojo



frago

pura, hela, travidebla

klara

malsupro de rivero

fundo

ŝtono

pli kaj pli...

plu

mallumo post objekto

ombro

“brako” de arbo

branĉo

veturi al alia urbo, lando...

vojaĝi

ne nia, fora, nekonata

fremda

Bulgario estas lando

lando

granda sala akvo

maro

ekvidi

rimarki

rapide alteriĝi

fali

pluvi

meti ien por ke aliaj ne trovu ĝin

kaŝi

kun bona volo

volonte

-at- **-it-** **-ot-**

Skrib**at**a, skrib**it**a, skrib**ot**a. *Sedang ditulis (kala kini), sedang ditulis (kala lampau), sedang ditulis (kala mendatang). Partisip pasif dapat juga berbentuk kala kini, kala lampau, atau kala mendatang.*

Kunmetitaj tempoj – *Kala majemuk*

ESTI	ESTU	ESTOS	ESTAS	ESTIS	ESTUS
-ANTA	-INTA	-ONTA	-ATA	-ITA	-OTA

Mi est**is** manĝ**onta**, kiam vi venis. *Saya (kala lampau) akan (mulai sedang) makan ketika kamu datang (kala lampau).*
Se mi est**us** sci**inta**, ke vi venos, mi est**us** prepar**inta** por vi vespermanĝon. *Seandainya saya tahu bahwa kamu akan datang, saya akan mempersiapkan makan malam untukmu.*

Kumpulan tanda waktu dibentuk dari bentuk **esti** *+ akhiran partisipal.*

Kosakata:

1 – sedang akan minum (kala mendatang), 2 – sedang minum (kala kini), 3 – akan diminum, 4 – telah diminum, 5 – menggunakan, 6 – sesuatu yang telah terjadi, 7 – harapan, 8 – gelap, 9 – kabut, 10 – selatan, 11 – biarpun, 12 – abu-abu, 13 – dunia, 14 – egois, 15 – sangat sedih, 16 – kobaran api, 17 – ceri, 18 – madu, 19 – biru, 20 – terutama, 21 – liburan, 22 – jalan kecil, jalan, 23 – stroberi, 24 – jelas, 25 – dasar, 26 – batu-batu, 27 – lebih, 28 – melompat melalui, 29 – bayangan, 30 – cabang, 31 – (taman) rumput, 32 – akan melalui, 33 – akan bepergian, 34 – asing, 35 – negara, 36 – laut, 37 – (telah) memperhatikan, 38 – merasakan, 39 – menjatuhkan, 40 – Hujan!, 41 – (telah) menyembunyikan, 42 – sampai, 43 – dengan senang/sukarela.

21 DUDEK-UNUA LECIONO

-ind-

"Tiu libro estas tre bona.
– Ĝi estas leg**ind**a[1]."
(Ĝi estas bona por legi.)



„Li ridas,
ĉar la filmo
estas ridinda.
(Ĝi estas bona por ridi.)

Tiu lando estas bela, estus bone viziti ĝin: ĝi estas vizitinda. Mi devis ridi, vidante tion, ĉar tio estis ridinda. En nia urbo estas multaj vidindaĵoj kaj memorindaĵoj[2]. Mi tion ne povas kredi, ĉar tio estas nekredinda. Tiu knabino estas aminda. Bedaŭrinde[3] mi ne povas iri kun vi.

-um-

Li gust**um**as[4] la supon.



Ŝi sun**um**as[5] sin.

Mi malsaniĝis pro malvarmo: mi malvarmumis[6].
Ŝi plenumos[7] vian deziron: ŝi faros, kion vi deziras.
Mi gustumis la kukon: mi prenis peceton[8], manĝis ĝin kaj diris: "Ĝi estas bongusta!" Kolumo[9], manumo[10] kaj

bona por ...-i

...-inda

malĝoji, ke io okazis

bedaŭri

manĝi iomete por scii la guston

gustumi

parto de io

peco



ĉemizo



kolumo

fari ion plene, tute

plenumi

butono

fermi per butonoj

butonumi

hejma nomo de Peter

Peĉjo

hejma nomo de Maria

Manjo

en la loko de

anstataŭ

preskaŭ ne, mi ne kredas

apenaŭ

Esperanto estas lingvo

lingvo

preskaŭ kiel

kvazaŭ

havi bildon de, esti kiel...

aspekti

trinkis multe da biero

ebria

forta krio kontraŭ iu

kolero

semi

kolekti fruktojn

rikolti



kaprino

butonoj[11] estas partoj de ĉemizo[12]. Kiam ni vestas nin, ni butonumas[13] la ĉemizon. Li rapide trarigardis la libron: li foliumis[14] en ĝi.

-nj- -ĉj-

Hejme la infanoj nomas la patron pa**ĉj**o[15] kaj la patrinon pa**nj**o[16]. Mia fratino nomiĝas Maria, sed mi nomas ŝin Ma**nj**o. Mia nomo estas Peter, sed miaj familianoj nomas min Pe**ĉj**o. Mian onklon mi nomas o**ĉj**o kaj la onklinon o**nj**o.

Anstataŭ Apenaŭ Kvazaŭ



Li devas lerni, sed li dormas: **anstataŭ**[17] lerni li dormas.

Ŝi estas tiel malproksime, ke ni **apenaŭ**[18] vidas ŝin.



La patro frapas[19] al la pordo, **kvazaŭ**[20] li estus fremdulo.

Anstataŭ lerni li ludas kun siaj geamikoj. Anstataŭ sukero oni povas uzi mielon. Anstataŭ helpi li malhelpas. Nia instruisto estas malsana. Anstataŭ li hodiaŭ venis alia instruisto. Li anstataŭis nian instruiston.

Li apenaŭ scias legi (li preskaŭ ne scias legi). Apenaŭ ŝi venis, tuj ŝi devis foriri. Mi apenaŭ povos veni (mi ne kredas, ke mi povos veni). Mi lernas la anglan[21] lingvon[22], sed mi apenaŭ povus skribi angle leteron.

Mi amas vin, kiel se vi estus mia frato: mi amas vin kvazaŭ vi estus mia frato. La ĉielo estis pura, kvazaŭ balaita. Vi aspektas[23], kvazaŭ vi estus malsana. Li iris, kvazaŭ li estus ebria[24]. Ŝi parolas, kvazaŭ ŝi ĉion scius. Tiu homo aspektis, kvazaŭ li estus falinta el la luno.

PROVERBOJ

Senpova kolero[25] – ridinda afero. Multe komencite, malmulte plenumite. Se Peĉjo ne semos[26], Petro ne rikoltos[27]. Falinta floro ne revenos al la branĉo. Kia panjo, tia Kanjo.

LA SEP KAPRIDOJ[28]

(Fabelo[29])

Estis foje arbaro, en la arbaro herbejo kaj sur la herbejo dometo. En la domo loĝis kaprino. Ĝi havis sep infanojn. Foje la patrino devis foriri por aĉeti lakton. Forirante ŝi diris al la kapridoj: "Kiam mi estos for, ne enlasu[30] la lupon[31]! Vi ekkonos lin, ĉar li havas malaltan voĉon kaj nigrajn piedojn."

La lupo aŭskultis sub la fenestro. Kiam la patrino estis for, li ekkriis: "Malfermu la pordon, karaj kapridoj! Mi estas via patrino." Sed la kapridoj respondis: "Vi ne estas nia patrino! Nia patrino havas altan voĉon!"

La lupo foriris al la forĝisto[32]. Tiu forĝis al la lupo pli altan voĉon. La lupo revenis, frapis al la pordo kaj diris per dolĉa voĉo: "Malfermu la pordon, karaj kapridoj! Mi estas via patrino." – "Montru al ni viajn piedojn!", diris la kapridoj. La lupo montris sian piedon tra la fenestro. – "Vi ne estas nia patrino! Nia patrino havas blankajn piedojn, sed viaj piedoj estas nigraj!"

La lupo iris hejmen. Li prenis farunon[33] kaj blankigis siajn piedojn. Poste li revenis, frapis al la pordo kaj diris per dolĉa voĉo: "Malfermu la pordon, karaj kapridoj! Mi estas via patrino." – "Montru al ni viajn piedojn!" La lupo montris la piedojn. Ili estis blankaj. La kapridoj malfermis la pordon. Tiam la lupo saltis en la dometon kun malfermita buŝo kaj manĝis la kapridojn – krom unu, kiu sin kaŝis.

La kaprino revenis hejmen kaj kion ŝi vidas! La pordo malfermita, ĉie malordo kaj la infanoj estas for. Ŝi vokas[34]: "Anjo, Peĉjo, Manjo, Joĉjo...", sed neniu respondas. Poste ŝi trovis la plej junan kapridon, kiu ĉion



kaprido

lasi eniri

enlasi



lupo

forĝisto

el ĝi oni faras panon

faruno

krii la nomon

voki



rakontis. Kiam ili eliris el la dometo, sur la herbejo ili trovis la dormantan lupon. La patrino prenis tranĉilon, distranĉis la ventron kaj la kapridoj elsaltis vivaj kaj sanaj. Ili alportis ŝtonojn kaj plenigis per ili la ventron de la lupo.

Kiam la lupo vekiĝis, li iris al la rivero. Kiam li volis trinki, li falis en la akvon. La kapridoj dancis kaj kantis. La malbona lupo neniam plu venos al ilia dometo.

Respondu la demandojn. La respondojn skribu:

Kio estas leginda libro? Kiam vi lastfoje malvarmumis? Kio estas kolumo kaj manumo? Kiel vi nomus viajn patron kaj patrinon, se vi hejme parolus Esperante?

Rakontu la fabelon "La sep kapridoj".

GRAMATIKO

-ind-

Vid**ind**a, memor**ind**a, rid**ind**a. *Layak dilihat, layak diingatkan, layak ditertawakan.*

Sufiks **-ind-** *berarti kelayakan akan sesuatu.*

-um-

Gust**um**i, plen**um**i, sun**um**i, kol**um**o. *Merasakan, memenuhi, berjemur, kerah.*

Kata-kata dari bermacam arti dapat dibentuk dengan sufiks **-um-***, yang tidak memiliki arti yang tetap.*

-nj-

Pa**nj**o, pa**ĉj**o, Ma**nj**o, Pe**ĉj**o. *Mama, papa, Mary (sayang), Peter (sayang).*

-ĉj-

Nama panggilan kesayangan dibentuk dengan sufiks **-nj-** *untuk perempuan, and* **-ĉj-** *untuk nama laki-laki, umumnya dengan kependekan akarnya. Sufiks-sufiks ini juga dipakai untuk menciptakan bentuk intim yang ditujukan antara anggota keluarga.*

Kosakata:

1 – layak dibaca, 2 – hal-hal yang layak diingat/dikenang, 3 – sayang, 4 – merasakan, 5 – berjemur, 6 – (telah) sedang pilek, 7 – akan memenuhi, 8 – potongan, 9 – kerah, 10 – manset, 11 – kancing, 12 – kemeja, 13 – mengancing, 14 – melihat-lihat, 15 – papa, 16 – mama, 17 – alih-alih/daripada, 18 – hampir tidak, 19 – mengetuk, 20 – seolah-olah, 21 – Inggris, 22 – bahasa, 23 – nampak, 24 – mabuk, 25 – kemarahan, 26 – akan menabur, 27 – akan menuai, 28 – anak kambing, 29 – fabel, 30 – melibatkan, 31 – serigala, 32 – pandai besi, 33 – tepung, 34 – memanggil.

22 DUDEK-DUA LECIONO

Trans

La knabo ĵetis[1] la pilkon[2] **trans**[3] la barilon[4].

La domo estas **trans** la rivero. Ĝi estas sur la **transa** bordo[5].

Ameriko estas trans la maro. Ŝi loĝas kontraŭ nia domo, trans la strato. Trans la rivero loĝas bela knabino. Transa domo estas tiu sur la kontraŭa flanko de la strato.

Preter

Preter[6] nia fenestro iras homoj: ili iras ĉirkaŭ la fenestro kaj poste plu. Li iris preter mi sen saluto. Ŝi preterkuris min. Preterkurante ŝi ridetis.

Ekster

Mi ne loĝas en la urbo, sed ekster[7] la urbo. Fiŝoj ne povas vivi ekster la akvo. En la domo estas varme, sed ekstere neĝas. Somere mi veturos al eksterlando. Ĉu vi korespondas kun eksterlandanoj?

Laŭ

Maria dancas tiel, kiel ludas la muziko: ŝi dancas laŭ[8] la muziko. Morgaŭ ŝi ekskursos, aŭ ŝi restos hejme: laŭ la vetero. La infanoj iris laŭ la rivero. Laŭ la fruktoj oni arbon ekkonas.

Ĵus

Antaŭ momento mi venis: mi ĵus[9] venis. En televido oni ĵus parolis pri novaĵoj el la mondo. Ĵus mi aŭdis pri tio.



tra



trans

tero apud rivero

bordo



ĵeti



pilko



preter

ne en, ne inter

ekster

laŭ

antaŭ momento

ĵus

diri sian nomon

prezenti sin

diri: “vi povas”

permesi

estu tiel bona kaj volu

bonvolu

en komenco

frue

surskribo (titolo)

titolo de viro

sinjoro

malhelpi

ĝeni

ne koleri, forgesi pri io malbona

pardoni

per forta voĉo

laŭte

respondo al: “mi dankas”

nedankinde

domo, kie oni montras filmojn

kinejo



aŭtobus-haltejo

Infano, kiun ĵus batis[10] la patro:
“Panjo, via edzo ne plaĉas al mi!”

Kritikisto: “Mi ĵus legis vian romanon”.
Aŭtoro: “Ĉu la lastan?”
Kritikisto: “Mi esperas, ke jes!”

“Ĉu en via urbo naskiĝis multaj grandaj homoj?”
“Laŭ mia memoro nur infanetoj”.

LA ĈIUTAGA ESPERANTO

Salutoj

Bonan matenon! Bonan tagon! Bonan vesperon! Bonan nokton! Fartu bone! Ĝis revido! Ĝis reaŭdo! Ĉion plej bonan! Agrablajn festotagojn[11]!

Prezento

Permesu[12] al mi, ke mi prezentu[13] min: mi estas ... . Mi ĝojas! Mi tre ĝojas, ke mi ekkonis vin! Ĉu vi estas sinjoro[14] (sinjorino, fraŭlo, fraŭlino) ... ? Kiu estas tiu sinjoro? Kiel vi nomiĝas? Kiel nomiĝas tiu knabo (knabino)? Lia nomo estas ... .

Vizito

Kie loĝas sinjoro ... ? Ĉu sinjorino ... estas hejme? Jes, bonvolu[15] eniri. Bedaŭrinde, li ne estas hejme. Kiam li revenos? Post unu horo. Bone, mi venos malpli frue[16] (poste). Mi ĝojas, ke mi vidas vin! Bonvolu sidiĝi! Ĉu mi ne ĝenas[17] vin? Ne, male, vi estas tre afabla. Estu tiel afabla kaj diru al mi ... . Pardonu[18], mi petas. Ĉu vi komprenas min? Jes, mi bone komprenas vin. Parolu malrapide, ĉar mi ne komprenas. Parolu pli laŭte[19]. Kie vi loĝas? El kiu lando vi estas? Kie vi laboras? Kio vi estas? Kion vi faras ĉi tie? Kia estas via adreso? Via loĝejo estas tre bela. Mi dankas, ke vi vizitis min. Ĉu vi povas viziti min hodiaŭ posttagmeze? Bone, mi venos je la 15 – a horo.

Sur la strato

Mi petas vin, kie estas ... ? Dankon! Mi dankas, ke vi helpis al mi. Vi estas tre afabla. Volonte[20]! Mi petas, diru al mi, kie

estas hotelo (teatro[21], kinejo, stacidomo, aŭtobus – haltejo, magazeno[22], kulturdomo).

Vojaĝado

Mi volas iri (vojaĝi, veturi) al ... . Ĉu tiu loko estas libera? Ĉu mi povas malfermi la fenestron? Kiel nomiĝas tiu ĉi stacio (urbo, vilaĝo, kvartalo[23], strato)? Kiam ni venos al ... ? Kiom da kilometroj estas ĝis ... ? Kiel malproksime estas de ĉi tie al ... ? Kiom kostas la bileto?

Demandoj

Kio estas tio? Por kio ĝi estas? Kion vi deziras? Kial vi tion faris? Ĉu vi parolas Esperante? Ĉu vi komprenas min? Ĉu mi tion diris bone? Kie mi povas aĉeti gazeton? Kie estas restoracio? Kio okazis? Kion vi diris? Kion vi faras? Ĉu tio estas vero? (Ĉu vere?)

Tempo

Kiam? – Matene. Frumatene. Antaŭtagmeze. Tagmeze. Posttagmeze. Vespere. Nokte. Noktomeze. Ĉiutage. Hodiaŭ. Kioma horo estas? Je kioma horo? Proksimume[24] je la sesa. Je la oka vespere. Antaŭ nelonge. Estas jam malfrue. Estas tro[25] frue. Kiomjara vi estas? Mi estas ... – jara.

Vetero

Kia vetero estas hodiaŭ? La suno brilas. Pluvas. Ni malsekiĝos. Pluvetas. Estas varme. La pluvo jam ĉesis. Blovas vento. Neĝas. Varmiĝis. Malvarmiĝis. La suno jam leviĝas[26] (malleviĝas = subiras). Sur la ĉielo estas nuboj. Vesperiĝas. Morgaŭ estos malvarme.

Surskriboj.

Eniro. Eliro. Fermu la pordon! Fermita. Atentu[27]! Unua etaĝo[28]. Ter – etaĝo[29]. Haltejo. Necesejo[30]. Lavejo. Por fumantoj[31]. Fumado malpermesita! Tiru[32]! Puŝu[33]! Alveno. Foriro.

Aliaj oftaj frazoj[34]

Ĉu tio plaĉas al vi? Jes, tio estas tre bela. Vi pravas[35]. Vi eraras. Tio ne gravas[36]. Ne zorgu pri tio! Ĉu vi ŝatas modernan (klasikan) muzikon? Ĉu vi deziras bombonon (glaciaĵon[37], cigaredon[38])? Ne, mi ne volas. Mi ne ŝatas dolĉaĵojn. Mi ne fumas. Ĉu vi povas prunti al mi plumon? Kien vi iras? Ĉu vi jam estis en ... ?

domo, apud kiu haltas vagonaroj

stacidomo

parto de la urbo

kvartalo

pli-malpli

proksimume

pli ol estas bone, pli ol sufiĉe

tro

sen akvo

seka

malfali

leviĝi

bone rigardi kaj aŭskulti

atenti

parto de domo (1-a, 2-a...)

etaĝo

necesejo

diri veron

pravi



cigaredo

uzi cigaredon

fumi

eniri en vagonon

envagoniĝi

atentinda

grava

sidiĝi al la tablo

altabliĝi

komence de mateno

frumatene

glaciaĵo



tramo



tiri



puŝi



aŭtobuso



bluzo

Ankoraŭ ne. Ni veturu per tramo[39] (vagonaro, aŭtobuso, aŭto, ŝipo). Jam venas la aŭtobuso. Ni eniru! Ni envagoniĝu (altabliĝu, enlitiĝu).

VESTAĴOJ[40]



Prenu kolorajn krajonojn kaj kolorigu la vestaĵojn:

Maria havas verdan bluzon[41], brunan jupon[42], blankajn ŝtrumpetojn[43] kaj brunajn ŝuojn[44].

Peter havas ruĝan puloveron[45], bluan pantalonon[46] kaj nigrajn ŝuojn.

La patrino portas flavan robon[47] kaj brunajn ŝuojn. Sub la brako ŝi havas brunan mansakon[48].

La patro havas oranĝkoloran ĉemizon, bluan kravaton, bluan jakon[49] kaj nigran pantalonon. Sur la jako kaj sur la pantalono estas poŝoj[50]. Sub la brako li havas grizan mantelon[51].

Memoru:

